

Januaro 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis

Nouveaux cours en ligne A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: André DELORME,
Andréa BERTRAND,
Marc-Olivier GRAZIANI, Pierre GROLLEMUND

ANTAŬPAROLO

Karaj Membroj,

Mi deziras al vi bonegan jaron 2025!

Mi deziras, ke nia asocio helpu la membrojn plibonigi sian region de la lingvo. Estas grave, ke ni daŭre proponu kursojn, staĝojn kaj agrablajn renkontiĝojn.

Mi deziras, ke nia asocio kresku, bonvenigante novajn membrojn el nia tuta regiono. La korespondaj kursoj estas parto de nia historio, kaj ni ne forgesu ilin en la nuna cifereca mondo!

Mi deziras, ke nia asocio plifortigu siajn rilatojn kun eksterlandaj esperantistoj, precipe tra la ĝemelaj kluboj. Tiuj rilatoj estas gravaj por riĉigi niajn spertojn kaj plivastigi la komunumon, kiujn nia asocio servas.

Fine, mi deziras, ke nia asocio ebligu al ĉiu membro esprimi sin en nia bruema mondo. Ĉiu devas havi la eblon esprimi sin, kaj ne nur kontribui al la dinamiko de la esperantista movado, sed ankaŭ en la mondo pli vaste, ĉar nia asocio havas humanismajn valorojn.

Ni kune faru ke la jaro 2025 estu bela por Esperanto Lyon!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI



De la virtuala kurso al vojaĝoj en Esperanto-mondo - Andréa BERTRAND:

Mi konatiĝis kun Gabin per ikurso en februaro 2021. Tiam li plenumis la dek lecionojn en unu monato kaj do mi proponis al li pliajn kursojn per ZOOM. Mi ne faras tian proponon al ĉiuj el miaj lernantoj de ikurso, kaj ne povas vere klarigi kial tio okazis ! Eble mi kaptis lian grandan intereson por Esperanto. La spektado de lia filmo memorigis al mi miajn proprajn spertojn : ankaŭ mi vizitadis la germanan urbon Hersberg kaj polan urbon, Bjalistoko, kiam mi estis komencinto, kaj poste mi trapasis lingvan ekzamenon en la oficejo de UEA en Rotterdamo ! Estis emocia momento por mi revidi tiujn lokojn. Krome ni povas ligi tiun travivaĵon kun la projekto de Emmanuel Desbrières en la liceo de Salins les Bains, kiu disvastigas la lingvon kiel rimedon por vojaĝi.

▶ ESPERANTE EŬROPEN : Mia vojaĝo al la malk...



Gastigado de Miguel kaj Daimi en Liono – Alvoko al volontuloj

Kadre de la vojaĝo de Miguel kaj Daimi, kuba paro, tra Francio, ni estas petataj organizi ilian eventualan haltadon en Liono antaŭ ol ili vojaĝos al Rennes.

Ni povus gastigi ilin en Liono inter la 1-a kaj la 3-a de majo 2025. Tio inkluzivus:

- Amikan vesperon, por ke ili malkovru nian asocion kaj nian urbon.
- Noktan gastigadon ĉe unu el niaj membroj.

Por tio ni serĉas volontulojn kiuj povus:

- Gastigi ilin en sia hejmo por unu aŭ du noktoj.
- Partopreni en la organizado de ilia restado, ekzemple por vizitoj aŭ manĝoj.

Se vi interesiĝas aŭ disponeblas, bonvolu informi nin, por ke ni povu organizi ĉion laŭeble plej bone kaj respondi al ili ĝustatempe.

Zamenhofa festo!

La pasintan Dimanĉon, 8an de Decembro, Esperanto Liono organizis la Zamenhofa festo, kiu okazis en la domo de solidarecoj. La temo pri tiu festo estis la memorkapablo, kaj tiu tago havis plenan programon !

Ni gastigis anojn de Esperanto Liono, sed ankaŭ anojn de Esperanto Grenoblo, kaj nian plejestimatan Pierre Groellemund de Saint-Etienne kaj posttagmeze eĉ kelkajn samideanojn venintajn de Sviso !

Matene, ĉiuj partoprenantoj komencis prezentiĝi, ĉirkaŭtable ; kaj poste, ni ludis per novaj memordudoj konstruitaj de Neil.



Tagmeze, ni amike dividis niajn manĝojn, kaj multajn kukojn ! Tio estis bona ekzerco por babilu kun la gastoj. Poste, ni havis tre interesan prezentadon de Pierre, pri la arkitekturo de Nia Domo de Parizo kaj similaj katedralaj rekonstruadoj.

Fine, Marc-Olivier prezentis la metodon de Leitner por memoriĝi ĉion pli rapide kaj pli longtempe kiel la esperantistan vortaron (evidente ankaŭ por aliaj lingvoj).

Ĉiuj estis kontentaj pri tiu Zamenhofa Tago. Granda sukceso. Multajn dankojn al la organizantoj: Andrea, Pascale, Neil kaj nia prezidanto Marc-Olivier. Ĝis la venonta jaro !



☛ Letero el niaj legantoj:

Komence, dankon pro via akcepto, ĉiam afablega. Kaj dankon pro la bonbonoj, ĉokoladoj! Jes ja plezure gustumis ilin ni!

Dua objekto de mia mesagho: iom ridigi vin per miaj aventuroj!

Mi iris bicikle al la stacidomo La Part-Dieu (kiel vi scias). Ĉeloke, amaso da vojaĝantoj, kiuj iom interpuŝis unu la aliajn. Eble pro la Festo de Lumoj estis tiom da vizitantoj!

Nu, mi supreniris la aŭtomatan ŝtuparon al la kajo, portante mian biciklon, sed ho ve, iu puŝis min, mi preskaŭ falis, la biciklo glitis sub la ramplan mantenilon kaj blokiĝis! Tuj stopis la rul-ŝtuparo! Mi devis peti helpon, ĉar neniel eblis tiri mian biciklon. Venis sekureco-dungitoj, kiuj diris "*on n'a jamais vu ça!*" Ankaŭ mi ne, respondis mi!

Nu, fine venis dungito de bonteniga entrepreno: li sukcesis movi la mantenilon, mi retrovis mian biciklon, kun pneŭoj ech ne krevitaj. Kaj revenis hejmen!

Amuze, ĉu ne ? Nek mi, nek la vojaĝantoj, nek la ŝtuparo kulpas! Nur kulpas cirkonstancoj. Sed 2 avantaĝoj : 1/ amuza sperto por sekureco-dungitoj kaj por mi! 2/ Plia profesia sperto por la bontenisto!

Kaj okazo rakonti neatenditan aventuron al vi!

Fartu bone, ridu bone, en la vivo indas ridi! Ĝis revido!

Pierre GROLLEMUND



☛ Kreola, alia lingva sistemo - André DELORME

Kreola: nomo donita al lingvoj, kiuj aperis dum la nigrula sklavkomerco inter la 16-a kaj la komenco de la 19-a jarcentoj kaj ankoraŭ hodiaŭ parolataj de la posteuloj de tiuj sklavoj en diversaj regionoj de la mondo (Antiloj, Gujano, insuloj de la Hinda Oceano, Haitio, Kabo-Verdo, ktp.). La vorto nun nomas aŭtonoman lingvan sistemon, de miksa origino, rezultanta el la kontakto de eŭropa lingvo kun indiĝenaj aŭ importitaj lingvoj (Antiloj), kiu fariĝis la gepatra lingvo kaj ĉefa lingvo de komunumo. Miksitaj lingvaj sistemoj rezultiĝantaj el kontakto inter eŭropaj kaj indiĝenaj aŭ deportitaj populacioj, same kiel la respektivaj kulturoj de la malsamaj kreolaj populacioj, ankaŭ estas priskribitaj kiel kreolaj.

La unueco de la kreolaj kiel grupo de naturaj lingvoj estis historie konstituita. Efektive, similaj eventoj okazigis la aperon de ĉiu el ili: deportado al fremda lando, miksaĵo de loĝantaro sen komuna lingvo, devigo uzi la lingvon de la mastro por kompreni ordonojn. Tiel formiĝis kreolaj lingvoj kvalifikitaj kiel francaj, anglaj, portugaliaj, nederlandaj. Ilia leksiko estas preskaŭ identa al ĉiu el tiuj lingvoj. Ili estas pli similaj unu al la alia en sintakso, fonologio, semantiko; oni povas paroli pri tipologia unueco de la kreolaj. La grava nocio de substrato ĉe kelkaj kondukas al kunekzisto de fremda leksikono, franca, angla ktp., kaj komuna afrika gramatiko. La funkciaj agadoj de portugalaj eksportistoj ofte estas la origino de iuj kreolaj, ili estis dum longa tempo perilo de simpligita sistemo por komunikado.

En lingvistiko, kreola lingvo (en angle: creole; en hispane: criollo; en portugale: crioulo) estas lingvo kiu fariĝis indiĝena en iu socio. Same kiel ĉiu vivanta lingvo, la kreolaj estas karakterizitaj per gramatika sistemo, havas stabilan kaj ampleksan vortprovizon, kaj estas akiritaj de infanoj kiel sia denaska lingvo. La preciza nombro da kreolaj lingvoj estas neklara. La kreola kun la plej granda nombro da parolantoj estas la Haitian, kun preskaŭ dek tri milionoj da denaskaj parolantoj, sekvatan de Tok Pisin kun ĉirkaŭ kvar milionoj, la plej multaj el ili dulingvaj parolantoj.

Februaro 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00

Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com

Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj Membroj,

Baldaŭ alvenos nia jarkunveno, kiu certe okazos en marto. Ni baldaŭ sendos al vi la oficialajn invitilojn. Tio estos bonega okazo por ĉiuj pripensi, kiel kontribui al la evoluo de nia asocio.

Ni bezonas helpon por komuniki! Ni ne komunikas sufiĉe, kaj tio estas bedaŭrinda por lingva asocio! Sed ĉiu povas kontribui iomete! Vi povas aliĝi al la Konsilantaro aŭ simple montri vin disponebla por helpi.

Ekzistas multaj manieroj helpi: ĝisdatigi nian paĝon en Facebook, Instagram kaj retejo, komuniki kun lokaj ĵurnaloj, skani niajn arkivojn, kaj multe pli ankoraŭ pli simplaj.

Mi invitas vin jam nun komenci pripensi, ĉu vi povas kontribui al nia asocio, aŭ pli simple ĉu vi povas dediĉi iom da via valora tempo al nia centjara asocio. Ĉiu ideo aŭ ago, eĉ malgranda, povas fari grandan diferencon!

Ni antaŭĝojas pri via partopreno!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ Sukcesaj Stagoj de Esperanto-Liono: Por ĉiuj!



Nia asocio ĝojas anonci, ke la stagoj por ĉiuj niveloj daŭras kun granda sukceso! Ĉi tiuj intensaj renkontiĝoj celas unu gravan celon: ke ĉiuj partoprenantoj povu paroli Esperanton flue kaj memfide. Ni kredas, ke bone paroli nian lingvon estas la plej bona reklamo por Esperanto!

La lasta stago, gvidata de Marilou, okazis en la pitoreska kvina distrikto de Lyon. La etoso estis vigla kaj inspira, kaj ĉiuj partoprenantoj montris grandan sindediĉon kaj entuziasmon. Gratulojn al ili pro ilia investo en la mondo de Esperanto kaj pro la progreso, kiun ili jam atingis!

Ĉu vi ankaŭ volas plibonigi viajn kapablojn en Esperanto? Aliĝu al unu el niaj venontaj staĝoj! Ili estas malfermitaj al ĉiuj, sendepende de via nivelo. Kune ni povas daŭre konstrui viglan komunumon de esperantistoj kaj antaŭenigi nian lingvon al pli vasta publiko.

Ni antaŭĝojas vidi vin en nia sekva renkontiĝo!

☛ Malkovru rete la Arkivojn de Esperanto-Liono!

Ni ĝojas anonci, ke ni komencis ciferecigi kaj enretigi niajn arkivojn! Ĉi tiu projekto ebligas ĉiujn esplori la riĉan historion de nia asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-movado.

Inter la unuaj elŝuteblaj materialoj troviĝas veraj trezoroj, inkluzive de la unuaj numeroj de niaj propraj bultenoj, kiuj estis verkitaj en... 1907!

Alia dokumento estas la kompleta kolekto de La Praktiko, fama Esperanto-gazeto. La Praktiko, kun sia slogano "La gazeto, kiu instruas kaj amuzas", aperis de 1932 ĝis 1941 kaj poste, sub la nomo La Gazeto de la Mondpopolo, de 1946 ĝis 1970.

Antaŭ la Dua Mondmilito, ĝi estis eldonita monate kun 12 ĝis 16 paĝoj en formato 31x24 cm. La gazeto estis publikigita de la Internacia Cseh-Instituto en Hago, Nederlando, kaj redaktita de la tre fama kaj faka Andreo Cseh.

Grava noto pri la enhavo de tiu gazeto: ni volas atentigi, ke en kelkaj artikoloj troviĝas humuraĵoj, kiuj hodiaŭ povas esti konsiderataj neadekvataj, ĉefe pri ne-okcidentaj kulturoj aŭ pri virinoj. Ĉi tiuj estas la pensmaniero de alia epoko kaj ne spegulas niajn nuntempajn valorojn. Ni invitas ĉiujn legantojn konsideri ilin en ilia historia kunteksto.


Malgraŭ tio, ni estas konvinkitaj, ke La Praktiko restas nepre valora: ĝi estas bonega rimedo por lerni Esperanton, malkovri interesajn enhavojn kaj vojaĝi tra la tempo por pli bone kompreni la evoluon de nia movado.

Krome, en nia retejo, vi trovos ankaŭ specialajn dokumentojn, kiel ekzemple unikajn notlibrojn verkitajn de instruisto en Alĝerio!

Atentu! La retejo, kie niaj retaj arkivoj troviĝas, ankoraŭ estas dum konstruado. Tial ni tre bonvenigas helpojn de ĉiuj, kiuj ŝatus kontribui al ĉi tiu grava laboro. Se vi havas iom da tempo kaj emon partopreni, viaj lertaj manoj estus tre valoraj por plirapidigi la ciferecigon kaj aranĝon de ĉi tiuj dokumentoj rete!

Ni esperas, ke ĉi tiuj materialoj inspiras vin kaj ke vi ĝuos ĉi tiun historian esploron. Restu atentaj – pliaj arkivaj trezoroj alvenos baldaŭ!

<https://esperantolyon.org/niaj-arkivoj-nos-archives/>



☛ Mia Vizito al la Kastelo de Voltaire - Marc-Olivier GRAZIANI

Mi ĵus vizitis la domon ofte nomatan "kastelo de Voltaire" (kvankam ĝi ne estas vera kastelo ĉar li detruis la antaŭan). Ĝi estas grava loko en la vilaĝo Ferney, hodiaŭ konata kiel Ferney-Voltaire. Oni rakontas, ke jam en la tempoj de Voltaire estis konsiderite doni al la vilaĝo lian nomon – kvankam kelkajn samtempoj, kun certa ironio, ŝercis nomante ĝin Voltairopolis!

La influo de tiu fama filozofo estis gravega en la urbo Ferney: oni diras ke li transformis malsekajn kampoj en kultivablelojn per efikaj teknikoj kaj donis prosperon al la regiono per evoluo de la horloĝindustrio (ni ja troviĝas proksime al la svisa lando).



La Dua Vizaĝo de Voltaire

Mia vizito ankaŭ montris la malbonajn flankojn de Voltaire. Li ne estis nur fama pensulo, sed ankaŭ homo kun malagrablaj ecoj:

Amiko de Potenco: Kvankam li ofte kritikis la monarkion, li ĉiam serĉis proksimecon kun la riĉaj kaj influaj homoj, kiel Frederiko la 2a de Prusio. En lia "kastelo", kiu estis lia lasta domo, li eĉ agis kiel landestro.

Ne Respektemaj Agadoj: Voltaire verkis gravan traktaton pri toleremo. Sed li ankaŭ lukris monon pro la triangula komerco (kiu temas pri slaveco) per la Indi-kompanio. Kelkaj historiistoj ne certas ke li vere sciis pri tiu slaveca afero, sed vi devas scii ke Voltaire estis riĉega : li akiris multan monon per matematikaj trukoj en la loto de Parizo!

Religiaj Ideoj: Li estis deisto, kaj ne ateo kiel ni kutime pensas pri li. La problemo estas ke li uzis ideojn por montri ke eĉ veraj ateistoj, kiel la abato Meslier, povus esti konsiderataj deistoj. Vi ankaŭ devas scii ke li volis konstrui sian propran kapeleton kaj eĉ kontaktis la papon kiun li multe kritikis por akiri sanktajn relikvojn por sakrigi sian kapeleton.

Malakcepteblaj Opinioj: En kelkaj verkoj, Voltaire montras malrespekton. Lia verko foje enhavas mizandrecon, mizoginecon, homofobion kaj antisemitismon, kvankam iuj historiistoj emfazas la kuntekston de la epoko kaj la nuancojn de lia pensado.

Pozitivaj Ecoj kaj Talentoj

Kvankam Voltaire havis kontroversajn flankojn, li ankaŭ montris multajn pozitivajn ecojn:

Batalo Kontraŭ Maljusteco: Li estis la unua vera franca intelektulo kaj batalis kontraŭ maljusteco. Li partoprenis en famaj defendaj kazoj, ekzemple la afero Jean Calas.

Logikaj Argumentoj: En siaj verkoj, kiel tiu pri samseksemuleco, li uzis logikajn argumentojn. Li klarigis, ke oni ne povas kondamni ilin (kvankam li ne ŝatis tiujn agojn). Historiistoj atentigas pri la historia kunteksto kaj la subtila diverseco de lia pensado.

Lukto kontraŭ obskurismo: Li uzis la esprimon "regresigi la malbonon". Tiu esprimo montras, ke li batalis kontraŭ mallumo kaj absoluta potenco.

Talenta Verkisto: Voltaire estis tre talenta verkisto. Hodiaŭ, ni memoras liajn "Filosofiajn Rakontojn", ekzemple la faman libron *Kandido*. Lia plumo kaj ironia stilo faris lin fama en la franca beletro. Ironio estas plena parto de la franca identeco pro la influo de Voltaire.

Aliaj Interesaj Faktoj pri Voltaire

- Li estis malliberigita dufoje en la fama malliberejo Bastille, (pro la afero de la Kavaliro de Rohan la unuan).
- Li estis ekzilitigita en Anglio. Tiam li rapide lernis la anglan lingvon kaj malkovris pli liberan mondon.
- Li vivis sub la regnoj de tri reĝoj ĉar li naskiĝis en 1694 kaj forpasis en 1778.
- Fine de sia vivo, li fariĝis vegetariano.
- Li inventis lian nomon "Voltaire". Tiu invento montras ke li bone komprenis la gravecon de komunikado. Lia vera nomo estis François-Marie Arouet.

Konkludo

Voltaire estis kompleksa persono: li kunportis grandan influon en la kulturo de Francio per siaj novaj ideoj kaj agoj, sed ankaŭ montris aspektojn de sia vivo, kiuj hodiaŭ povas ŝajni malfacile akcepteblaj. Tamen, lia pensaro kaj verkaro invitas nin konsideri la universalan lukton por justeco, libereco kaj humaneco. Li mem estis kritikema, kaj tial ni rajtas kaj devas analizi liajn fortojn kaj malfortojn per la sama rigardo. En monda historio, li restas simbolo de intelekta kuraĝo kaj esploro, kies ideoj, malgraŭ siaj limoj, plu inspiras nin defii la mallumon kaj celebri la lumon de racio kaj... ironio!

Marto 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00

Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com

Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

Assemblée Générale : Mardi 11 mars à 18h45 (accueil des membres à partir de 18h30) au KoToPo, et à distance.

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj Membroj kaj Amikoj,

Ĉi tiu monato estis trankvila por nia asocio, sed tio ne signifas ke ni faris nenion! Niaj agadoj daŭras kun la sama energio kaj entuziasmo. La kursoj, renkontiĝoj kaj aliaj iniciatoj sekvas sian vojon, dum ni iom post iom adiaŭas la vintron kaj bonvenigas la printempon.

Kaj kiu diras printempon, tiu diras novan komencon! Pri tio, ne forgesu ke nia jara kunveno alproksimiĝas, kaj ĝi estas bona momento por konsideri la pasintan jaron, pripensi novajn projektojn kaj konstrui la estontecon de la asocio kune. Ĉi tiu grava rendezuo okazos marde, la 11-an de marto je la 18:45 ĉe KoToPo.

Ni ĝojas renkonti vin baldaŭ kaj deziras al vi belan komencon de printempo!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ BEMI en Liono:

Neil raportas al ni, ke BEMI pasis tra Liono la 13an de februaro, kaj malgraŭ la pluvo, li sukcesis bicikili kun ili.

BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) estas grupo de esperantistoj, kiuj ĝuas bicikli kaj uzi Esperanton kiel komunan lingvon. Fondita en 1981, BEMI fariĝis la unua faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). La organizo celas aranĝi almenaŭ unu internacian biciklokaravanon ĉiujare kaj funkcias kiel kontakto por biciklantaj esperantistoj tutmonde. Interese, BEMI ne havas oficialan membrecon; se oni biciklas kaj uzas Esperanton, oni rajtas nomi sin

BEMlano. La membroj kunvenas dufoje jare: somere dum la Internacia Junulara Kongreso (IJK) kaj vintre dum la Junulara E-Semajno (JES).
bemi.tejo.org



☛ Loka Komunikado en telegram:

Ni deziras informi vin, ke ekzistas de longa tempo Telegram-grupo por esperantistoj en la regiono Rodano-Alpoj. Ĉi tiu grupo, nomata "Esperanto en Rhône-Alpes", celas kunigi esperantistojn de la regiono por diskuti, kundividi informojn kaj organizi eventojn. Aliĝante al la grupo, vi povos konektiĝi kun aliaj lokaj esperantistoj kaj resti informita pri estontaj renkontiĝoj kaj agadoj. Por aliĝi, serĉu "Esperanto en Rhône-Alpes" en Telegram aŭ vizitu la retejon Telegramo.org, kie vi trovos liston de diversaj Esperanto-grupoj, inkluzive de tiu por Rhône-Alpes :
<https://rodanoalpoj.telegramo.org/>

☛ **Pri KoToPo:** Neil ĝojas anonci, ke por niaj renkontiĝoj ĉe KoToPo, ni havas novan maskoton por helpi vin elekti nian tablon! Ĉi-foje, ili estis kvin homoj, kiuj ĝuis la vesperon kune. Memoru, ni renkontiĝas ĉiun lastan mardon de la monato ĉe KoToPo por la evento "Kiel vi". Venu kun ni por praktiki Esperanton kaj amuziĝi!



☛ Mi vizitis la ekspozicion pri Zurbarán en Liono - Marc-Olivier GRAZIANI

Mi vizitis la ekspozicion "Zurbarán" en la Muzeo de Belartoj en Liono. Ĝi estas mirinda ekspozicio pri la hispana pentristo Francisco de Zurbarán kaj lia arto.



Unu el la plej impresaj momentoj estis en granda ĉambro kun tri pentraĵoj de Sankta Francisko. Ili staras antaŭ ni, kvazaŭ vivantaj. La etoso estas solena kaj profunda. Vere eksterordinara sperto!

La ekspozicio ankaŭ montras, ke la influo de Zurbarán daŭras ĝis hodiaŭ. Ni povas vidi modernajn artaĵojn, modon kaj fotojn inspiritajn de lia stilo. Lia maniero ludi per lumo kaj ombro ankoraŭ fascinas artistojn en la 21-a jarcento.



Aprilo 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Pascal FANTGAUTHIER - Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj Membroj kaj Amikoj,

Koran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis en la jara kunveno de nia asocio! Ĉi-jare pli ol 60 % de la membroj voĉdonis – tio estas tre bona novaĵo.

Post la Ĝenerala Asembleo, la komitaturo kunvenis por elekti la novan estraron. Jen la rezultoj :

Gérard Vandervelden fariĝis kasisto,
Stéphane Richard fariĝis vic-kasisto,
Neil Roberts fariĝis sekretario,
Marilou Cochard fariĝis vic-sekretariino,
kaj **Marc-Olivier Graziani** estis elektita prezidanto.

Ni jam bone preparas la jaron 2025, kaj la agadoj de nia asocio daŭras kun energio kaj entuziasmo.

La printempo jam sentebles ĉie – en la ĝardenoj, sur la balkonoj, kaj ankaŭ en nia asocio. Kiel la plantoj reekfloras, ankaŭ nia agado floras kun nova vigleco.

Ni restu kune por plifortigi Esperanton en nia regiono!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI



☛ **Mia parolado legita por malfermi nian ĝeneralan asembleon** - Marc-Olivier GRAZIANI

En tiu internacia kunteksto, kiu havas pli da imperiismo, mi demandis min pri la rolo de Esperanto.

Ni ĉiuj scias en nia asocio : la unua celo de nia lingvo estas helpi justan komunikadon inter homoj de malsamaj originoj. Alivorte, Esperanto ne trudas kulturajn aŭ politikajn regulojn.

Ni povas demandi : ĉu Esperanto povas helpi fari diplomation kun egaleco, anstataŭ kun forto ?

Kompreneble, mi ne pensas naive, ke unu lingvo povas forigi la logikon de povo. La homo estas socia animalo, kun teritorio kaj potenco. Tio ne ŝanĝiĝos. Sed Esperanto memorigas nin, ke diplomatio ne devas esti batalo, sed kompreno. Ĝi estas la voĉo de nia homeco. Ni povas fari pli bonan mondon kun dialogo, ne kun batalo. Ni ne bezonas esti pli fortaj por agi kun humaneco.

En tiu kunteksto, Esperanto povas :

- **Helpas kulturen interŝanĝon sen regado.**
Tio estas la vojo de respekto.
- **Respekti naciajn identecojn sen forviŝi ilin.**
Tio estas diverseco.
- **Rifuzi la logikon de povo.** Kiel diris La Boétie : *Rezolute ne plu estu servemaj, kaj vi estos liberaj.*
- **Subteni egalan voĉon por la popoloj.** La popolo ne estas la ŝtatestro. Ekzemple, Putin ne estas Rusio, Trump ne estas Usono, Macron ne estas Francio.
- **Helpi civilan diplomation.** Ne nur inter ŝtatoj, sed ankaŭ inter homoj. Tiel oni povas pli bone kompreni problemojn, kun pluraj voĉoj, ne kun unu sola potenco.

Eĉ se Esperanto ne estas tre uzata de ŝtatoj, ĝi jam havas rolon en la civila socio. Ĝi estas grava, ĉar ĝi ofertas alian manieron paroli kun aliaj – kun respekto kaj kompreno. Estas nia tasko uzi ĝin !

Nia asocio, eĉ se loka, estas parto de tiu mondskala movado. Per niaj kursoj, renkontiĝoj kaj interŝanĝoj, ni kreas konkretajn ligilojn por neŭtrala kaj justa projekto. Gravas memori, ke ĉiu voĉo gravas. Eĉ en malgranda skalo, Esperanto estas potenca ilo por interkompreniĝo. La etaj pontoj, kiujn ni konstruas ĉi tie, estas parto de tutmonda laboro.

☛ **Dankadoj:** Karaj membroj de nia asocio,

Mi volas esprimi mian grandan dankon al ĉiuj, kiuj helpas nian asocion per sia sindediĉo kaj bonkoreco. Vi faras ĝin pli forta kaj pli bela ĉiutage.

Grandan dankon al Andréa, kiu estis prezidantino dum multaj jaroj. Ŝia energio kaj inteligenteco donis multe al nia grupo. Ŝi scias bone paroli, skribi, kaj klarigi la valoron de Esperanto. Ŝi estas la plej bona reklamilo por nia lingvo : ŝi parolas, verkas kaj instruas perfekte.

Grandan dankon ankaŭ al Stéphane, nia vic-kasisto kaj kasisto dum multaj jaroj. Li ĉiam estas helpema kaj zorgema. Li bone prizorgas la monon de la asocio. Lia laboro estas malgranda videble, sed tre grava por ĉiuj. Li klarigas ĉion kun pacienco. Li estas fidinda kaj afabla homo, kaj ni feliĉas havi lin.

Mi ankaŭ volas danki Anita, kiu estis plurfoje sekretario de nia asocio. Ŝi estas simbolo de la etiko kaj homaj valoroj de Esperanto. Ŝi estas modesta, sed tre forta. Ŝi montras, ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed ilo por pli bona mondo. Estas honoro havi ŝin kun ni.

Mi kore dankas Marilou, kiu partoprenis en la kunveno de la konsilantaro. Ŝi ofte donas sian opinion, respondas al petoj, kaj zorgas pri la asocio. Ŝia helpo estas tre grava por nia vivo kiel grupo.

Mi volas ankaŭ saluti Gérard, kiu hodiaŭ transprenas la laboron de kasisto. Bela tasko ! Li konas bone nian asocion, kaj li organizas la arkivojn. Dankon, Gérard, pro via tempo kaj atento !

Fine, specialan dankon al Neil, nia tre inteligenta membro. Li scias bone uzi la komputilon kaj ankaŭ pensi profunde pri Esperanto. Li ne nur scipovas la lingvon, sed ankaŭ klarigas kial ĝi estas grava. Hodiaŭ li fariĝas nia sekretario, kaj ni ĝojas labori kun li.

Dankon al ĉiuj ! Pro via engaĝiĝo, nia asocio povas iri antaŭen, kreski kaj disvastigi Esperanton.

Vivu la internacia lingvo !

Ekstremaduro - Pascal FANTGAUTHIER



Ekstremaduro estas regiono malmulte konata en Eŭropo, proksime de Portugalio. Tio ĉi estas aŭtonoma provinco kun arbaroj, montoj kaj kampoj de olivarboj. La konstruaĵoj ofte transformas la pejzaĝon. Kvankam estas multaj lagoj kaj herbejoj, la bienoj dispelas ŝafojn, bovinojn kaj virbovojn pro transhumado.

Menciindas ankaŭ kelkaj naturparkoj.

La urbo de Cáceres estas unu el la plej belaj urboj de Hispanio. Fondita de la Romianoj, poste invadita de Araboj, la okcidenta parto de la murego estis rekonkerita de Reĝo Alfonso la 9-a de Leono en 1229.



Ekde tiu tempo, Cáceres fariĝis grava urbo, riĉiĝinta danke al la familioj de konkerantoj en Ameriko. Ili konstruis preĝejojn kaj palacojn. La vilaĝo Trujillo estas certe unu el la plej belaj vilaĝoj en Ekstremaduro, kun ronda placo. Tie naskiĝis Francisco Pizarro (oni povas viziti lian infanaĝan domon). La vilaĝo enhavas ankaŭ *alcazaba* (fortikaĵon konstruitan de Araboj). Kiel Cáceres, ĝi riĉiĝis pro la konkerantoj. La vilaĝo enhavas multajn monaĥejojn, palacojn, preĝejojn kaj ankaŭ belegan katedralon.



Ekstremaduro enhavas multajn monaĥejojn, izolitajn en naturo. La plej bela estas la Monaĥejo Guadalupe. En alia urbo nomata Quercus troviĝas monaĥejo dormejoforma. Ĝi estis la loĝejo de Reĝo Filipo post lia abdiko. Ĝi posedas belajn ĝardenojn kaj du klostrojn. La monaĥejo Palancia, proksime de Plasencia, situas en tre roka loko. Ĝi estas la plej malgranda monaĥejo de la mondo, kun nur tri monaĥoj. Ĝi estis fondita en 1500. En la malgranda manĝejo ne estas tablo, sed nur ŝtona seĝo. La monaĥoj dormas en malgrandaj ĉambroj. La fondinto, Sankta Petro de Alcantara, estis dominikano. Oni diras, ke li dormis sidante sur ŝtona seĝo en tre malgranda ĉambro. La preĝejo estas tre simpla kaj modesta. Ĝi neniam havis pli ol dek monaĥojn.

Ekstremaduro enhavas multajn belajn malgrandajn vilaĝojn, kie la vivado estas agrabla, kiel Almaraz kaj Alcántara. La du urboj Zafra kaj Plasencia situas proksime unu de la alia. Zafra enhavas unu el la plej belaj *paradores* (historia monumento transformita en hotelo), kiu antaŭe estis kastelo.

Plasencia posedas tre belegan katedralon, kaj la *parador* tie situas en eksa monaĥejo.

La ĉefa placo estas belega, kun tre bonaj restoracioj. Unufoje semajne okazas bazaro kun altkvalitaj produktoj.

Ekstremaduro estas regiono agrikultura, ankaŭ konata pro sia gastronomio. Oni konas tie la plej bonan ŝinkon de Eŭropo. Ĝenerale, ĝi estas regiono modesta. La homoj estas tre afablaj kaj tre gastemaj. Tio estas la parto de Hispanio kiun multaj preferas.

Majo 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00

Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com

Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj Membroj kaj Amikoj,

Kiam venas majo kaj junio, nia asocio pleniĝas de vivo kaj ideoj!

Ni kune finos la retajn kursojn de la jaro — gratulojn al ĉiuj! Ni ankaŭ preparas **piknikon por ĉiuj esperantistoj**, por simple babili, ridi kaj ĝui la sunon. Ni esperas vidi vin tie!

Ankaŭ ni zorgas pri la pasinteco: **la arkivoj de la asocio** estos transdonitaj al nova loko, por ke ili estu gardataj kaj konservataj. Malnova papero, sed riĉa historio!

Sed malgraŭ tiuj sukcesoj, KoToPo nun havas financajn malfacilaĵojn.

La loko, kie ni kelkfoje renkontiĝas, bezonas helpon. Se vi ŝatas la etoson de KoToPo, kaj volas ke ĝi daŭru, ne hezitu subteni aŭ simple paroli pri ĝi al viaj amikoj.

Ni dankas vin pro via energio, via ĉeesto, kaj via esperanta spirito!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI



☛ KoToPo bezonas vian helpon

Lastatempe pli kaj pli da homoj venas al KoToPo. Tie okazas atelieroj, kulturaj renkontiĝoj... Estas vere agrable vidi tian viclecon!

Sed malgraŭ tiu sukceso, KoToPo havas nun financajn malfacilaĵojn. Estas pli kaj pli da kostoj, kaj la volontuloj faras gravajn agadojn por konservi la lokon viva.

La Asocio Esperanto-Liono uzas tiun lokon por kelkaj eventoj. Ni ne estas la organizantoj de tiu alvoko, sed ni volas helpi per informado.

Se vi ŝatas KoToPon kaj ĝiajn agadojn, vi povas helpi per donaco.

Eĉ malgranda donaco estas grava.

Por pliaj informoj, ni invitas vin kontakti Guillaume : <http://www.kotopo.net/>

Dankon pro via subteno!

☛ Pikniko esperantista en Liono

Ni organizas **piknikon inter esperantistoj** en Liono!

📅 **Dimanĉe la 1-an de junio** (aŭ **dimanĉe la 22-an de junio**), depende de la vetero.

📍 **Parc de la Tête d'or**, sur la **granda gazono ĉe la suda parto**.

La informo pri la **definitiva dato** (aŭ nuligo) estos afiŝita **la tagon antaŭe** en nia retejo:

👉 esperantoliono.org

🎲 Ni invitas vin kunporti **simplajn ludojn**, ekzemple *Mölkky*, *ŝakoj*, *pilkaj*, aŭ aliaj por ĝui bonan etoson kune.

🍷 Ĉiu alportas sian propran **manĝaĵon**, **akvon**, **manĝilaron kaj tukon por sidi**. Ni ne rekomendas kunporti aŭ trinki alkoholaĵojn dum la pikniko.

La evento estas **malferma al ĉiuj esperantistoj de la regiono**.

Ni ĝojas vidi vin tie kaj babili kune en Esperanto!

☛ Novaj Kulturaj Renkontiĝoj!

Post iom da paŭzo, **Esperanto Lyon rekomencas siajn kulturajn kunvenojn** – kaj ni invitas vin al la **unua reta vespero**, marde la **20-an de majo je la 19:00!**

♦ **Jeromo VAŜE** montros al ni kiel li kontribuas al la **Reta Vortaro**.

♦ Poste, **Neil ROBERTS** prezentos sian memfaritan apon **Prevo**, kiu helpas uzi tiun vortaron facile kaj rapide.

Ĉu vi estas komencanto aŭ spertulo – ĉiuj bonvenas!
Ni uzos Zoom:

<https://us02web.zoom.us/j/81711694978?pwd=4NDAr7ayopKmrhuB2f57NowFPh1ZvS.1>

📌 Identigilo: 817 1169 4978

🔑 Pasvorto: 074142

Ni ĝojas revidi vin kaj kune revivigi niajn kulturajn renkontiĝojn!

☛ Ni transigos niajn arkivojn:

Saluton al ĉiuj,

Ni havas bonan novaĵon: ni transigos la arkivojn de la asocio al la ENS (École Normale Supérieure) en majo. Tio helpos konservi kaj organizi niajn dokumentojn.

Sed... ni bezonos iom da forto! La nuna loko ne havas lifton, kaj ni devos porti la skatolojn malsupren per la ŝtuparo. Do estos sufiĉe sporta!

📅 Ni planas fari tion en du partoj (ni ne ankoraŭ elektis precizan daton):

- Merkredon vespere, ni preparos la skatolojn kaj metos la unuajn librojn en ilin.
- Poste, lunde, ni faros vojaĝojn inter la du lokoj per veturilo de la ENS. (Atentu: ne estas kamiono, sed granda aŭto, do estos pluraj vojaĝoj, kaj tio daŭros preskaŭ la tutan tagon.)

Ni sendos baldaŭ mesaĝon por serĉi helpantojn!
Ni bezonos homojn por meti librojn en skatolojn, kaj ankaŭ fortulojn por porti la skatolojn.

Dankon antaŭe al ĉiuj kiuj povos helpi!

☛ TARGET2 - Marc-Olivier GRAZIANI -

Cédric, membro de nia asocio, venis al mia butiko. Ni parolis pri multaj aferoj, kaj babilante, li diris al mi, ke la eŭro ne estas vere unu sola mono. Mi surpriziĝis. Li invitis min esplori pri la sistemo nomata TARGET2.

Kion mi trovis? Jen simpla klarigo!


TARGET2 – Kaŝita sistemo de la eŭro, ankoraŭ uzata en 2025

TARGET2 (Trans-Eŭropa Aŭtomata Sistemo por Tuja Banka Pago) ebligas sendi monon inter bankoj de la eŭrozono. En 2025, oni kreis pli novan version nomatan "T2", sed multaj homoj ankoraŭ diras "TARGET2".

TARGET2 estas grava por ke la eŭro funkcii kiel komuna mono. Vi devas scii ke unu eŭro eldonita en iu eŭropa lando ne estas la sama kiel unu eŭro eldonita en iu alia lando. Ili ne estas plene interŝanĝeblaj.

Kiam iu sendas banke monon al alia lando kun eŭro, la sistemo TARGET2 registras tion. Ĝi estas kiel granda libro por la naciaj centraj bankoj (ekz. Banque de France, Bundesbank). La Eŭropa Centra Banko (ECB) kontrolas la tuton.

TARGET2 certigas, ke la pagoj estas faritaj tuj kaj sen risko de monŝanĝo. La sistemo registras la ŝuldojn kaj rajtojn inter bankoj. Tiujn oni nomas "saldoj de TARGET2".



Ekzemple, en 2025:

- Germanio havas pluson de ĉirkaŭ **1 080 miliardoj da eŭroj**
- Italio havas minuson de ĉirkaŭ **400 miliardoj da eŭroj**

- Francio havas minuson de ĉirkaŭ **200 miliardoj da eŭroj**

Tio montras, ke ne ĉiuj landoj estas en ekvilibro. Iuj fakuloj diras, ke tio estas danĝere, ĉar landoj kiel Germanio eble neniam ricevos sian monon. Aliaj diras, ke tio estas normala en komuna mono.

Se iu lando forirus el la eŭrozono, ĝi devus pagi sian ŝuldon en TARGET2. Se Italio forirus, ĝi devus pagi 400 miliardojn. Se ne, Germanio perdus sian monon. Tial eliri el la eŭro estas tre multekosta.

Kelkaj kritikis TARGET2, ĉar ĝi permesas al ŝtatoj "vivi per ŝuldo", sen politika decido. Ili volas, ke la saldoj estu regule pagataj, kiel en Usono, kie la bankoj rekvilibras inter si.

La Eŭropa Centra Banko diras, ke TARGET2 estas nur teknika afero, kaj ke ĝi helpas konservi stabilecon.

Resume: TARGET2 estas grava, sed ne konata. Ĝi helpas al la eŭro funkcii, sed ĝi ankaŭ kreas nevideblajn ŝuldojn inter landoj. Nun, TARGET2 (aŭ T2) daŭre funkcias, malkaŝe mastrumante miliardojn ĉiutage por teni la eŭron viva, per sistemo de virtualaj ŝuldoj.

Oni povas imagi, ke en la estonteco la ŝtataj bankoj malaperos, kaj eble la eŭro fariĝos tute cifereca mono. Tio jam iom post iom ŝajnas okazi... Kio okazos poste?

☛ Vikipedio uzas artefaritan intelekton por helpi volontulojn - Marc-Olivier GRAZIANI

La 1-an de majo 2025, la Fondaĵo Vikimedio anoncis sian novan strategion pri artefarita intelekton (AI). La celo estas subteni la volontulojn de Vikipedio per AI-iloj, kiuj helpas en taskoj kiel tradukado, kontraŭ-vandalismo kaj gvidado de novaj kontribuantoj, sen anstataŭigi la homan laboron.

Por redukti la ŝarĝon de AI-robotoj, kiuj aŭtomate kolektas datumojn de Vikipedio, la Fondaĵo kunlaboras kun Kaggle por proponi strukturitan datumbazon. Tiu datumbazo enhavas resumojn, priskribojn, bildajn ligilojn kaj aliajn datumojn, kiuj estas utilaj por trejni AI-modelojn.

Ĉi tiu strategio emfazas la gravecon de homa kontribuo kaj celas plifaciligi la laboron de la komunumo per travideblaj kaj malfermaj fontaj de artefarita intelekto.

Junio 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00

Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com

Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj Geamikoj,

La lerna jaro iom post iom alvenas al sia fino.

Ni finas la lastajn kursojn enrete, ni komencas fari provizojn de libroj por somera legado... kaj ni profitas tiun momenton por meti iom da ordo en niaj arkivoj. Unua transporto jam estas planita, kaj parto de niaj kolektoj trovos novan hejmon en la biblioteko de ENS Lyon.

Mi deziras ankaŭ informi vin, ke nia sidejo estos fermita de la 4a ĝis la 31a de aŭgusto 2025. Ni revidos nin freŝaj kaj pretaj por nova sezono plena de renkontiĝoj, lernado, kaj komuneco.

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ Letero, de Pierre al lionanoj kaj ankaŭ al membroj de regionaj kluboj ;

Saluton al ĉiuj ! Ĉu kelkaj el vi intencas partopreni la UK (internacian kongreson de UEA) en Brno venontan auguston ?

Mi fine decidis partopreni, sed mi volonte kunveturadus kun kelkaj el vi : estas pli simpatie, pli sekure, malplikoste kunveturadi, se ni kune uzos aŭtomobilon.

Sed, se la projekto konsistas en trajnoveturo, ĉu vi bonvolus diri al mi per kiu itinero vi pensas iri tien ? Ĉu per Strasburgo, Munkeno, Vieno, kaj fine Brno ? Aŭ ĉu per rekta vojo de Germanio al Prago kaj poste al Brno ?

Mi estus ankaŭ scivolema pri la hotel-rezervado. Ĉiam uzi la servojn de tiu usona servo « Book » ne vere bone efika ne multe plaĉas al mi. Kaj al Vi ?

Nu, multaj demandoj, ĉu ne ? Mi esperas ke mi ricevos respondojn sufiĉe rapide, ĉar la tempo forflugas !

Mi salutas vin tut-kore !
Pierre Grollemund

☛ Pikniko esperantista en Liono

La pikniko de la 1-a de junio estis nuligita pro vetero. Ĝi okazos la 22-an de junio.

📍 **Parc de la Tête d'or**, sur la **granda gazono ĉe la suda parto**.

La informo pri la **definitiva dato** (aŭ nuligo) estos afiŝita **la tagon antaŭe** en nia retejo:

👉 esperantoliono.org

🍷 Ni invitas vin kunporti **simplajn ludojn**, ekzemple *Mölkky*, *ŝakoj*, *pilkoj*, aŭ aliaj por ĝui bonan etoson kune.

🍷 Ĉiu alportas sian propran **manĝaĵon**, **akvon**, **manĝilaron kaj tukon por sidi**. Ni ne rekomendas kunporti aŭ trinki alkoholaĵojn dum la pikniko.

La evento estas **malferma al ĉiuj esperantistoj de la regiono**.

Ni ĝojos vidi vin tie kaj babili kune en Esperanto!

☛ Reta Vortaro kaj libera programaro – Kultura vespero pri kunlaboro

Dum nia lasta kultura renkontiĝo, ni parolis pri du gravaj aferoj en la esperanta mondo: la Reta Vortaro (ReVo) kaj la aplikaĵo PReVo.

Ĵeromo kaj Neil instruis al ni multajn utilajn aferojn pri ReVo, ĝia historio, kaj ĝia uzo. Ni lernis kiel efike serĉi vortojn, kiel legi la difinojn kaj kion signifas la mallongigoj uzataj en la vortaro. Ili montris al ni kelkajn praktikajn konsiletojn, kiuj helpas pli bone kompreni la strukturon de la artikoloj kaj pli rapide trovi la ĝustan signifon aŭ kuntekston. Ĉi tio estis tre utila eĉ por tiuj, kiuj jam kutimas uzi ReVo, ĉar oni ofte ne konas ĉiujn eblojn, kiujn ĝi proponas.


Poste, Neil montris sian propran aplikaĵon por Android, kiu faciligas la uzadon de la Reta Vortaro. Lia programo estas libera programaro. Tio signifas ke ĝi estas malferma, senpaga kaj respekta al la uzantoj. Neil parolis ne nur pri tekniko, sed ankaŭ pri libereco kaj kunlaboro. Li montris, ke teknologio povas esti ilo por komuneco, ne por profito.

Ĵeromo kaj Neil precizigis al ni, ke ili ne faras tion por mono aŭ reklamado. Ili laboras por la komunumo, donante sian tempon kaj scion.

Laŭ mi, temas ne nur pri teknikaj aferoj, sed ankaŭ pri projektoj, kiuj montras kiel la interreto povas helpi al intelekto kolektiva, la komuna scio de ĉiuj homoj. Li ankaŭ montras, ke la interreto ne devas utili al profito, sed al libera interŝanĝo de scioj. Tiaj iniciatoj memorigas al ni la originan celon de la interreto: kunligi homojn, por lerni kaj krei kune.

Danke al ĉi tiuj du prezentoj, ni vidis ke eblas uzi la interreton por konstruadi kolektivajn saĝon, por helpi unu la alian, kaj por defendi pli humanan manieron uzi teknologion.

Ni kore dankas Ĵeromon kaj Neil. Ili memorigas al ni, ke Esperanto ne estas nur lingvo : ĝi estas ideo pri kunvivado kaj reciproka helpo.



☛ La arkivoj ekmoviĝas – unua paŝo al pli malpeza sidejo

Lundon la 16an de junio markos gravetan paŝon por nia asocio: dank' al la konsento de ENS Lyon, ni komencis la translokigon de parto de niaj arkivoj.

Ĉi tiu laboro komenciĝis kelkajn tagojn antaŭe. Ni renkontiĝis en nia sidejo kun Catherine (kiu kutime loĝas en Draguignan), Marie-Lou, Thierry R., André, Andréa, Monique kaj Anita por kune enpakigi la librojn en grandajn skatolojn. La tasko ne estis facila ĉar la libroj estas pezaj, la skatoloj grandaj, kaj nia malnova sidejo ne helpas: tri etaĝoj kun duobla ŝtuparejo postulas veran fizikan penadon, precipe por malsupreniri kun tia ŝarĝo... kaj reiri supren post tio!

Sed danke al bona organizo kaj kunordigo, ĉiu trovis sian rolon, kaj ni sukcesis trairi tiun etapon per kuraĝo kaj bonhumoro.

La skatoloj nun estas deponitaj kaj ĉio estos transportita al ENS Lyon per profesia transportisto. Tie, la dokumentoj estos konservataj kaj, espereble, valorigitaj laŭ siaj historiaj interesoj.

Kompreneble, ni ne donis ĉion. Ni gardis niajn "trezorojn", kaj tiujn librojn, kiuj estas vere utilaj por la praktiko de Esperanto, por niaj kursoj, kaj ankaŭ kelkajn interesajn dokumentojn. Ni fordonis plejparte malnovajn periodaĵojn kaj librojn ne plu uzatajn, por faciligi la laboron kaj ordon en nia sidejo.

Ĉi tiu ago estas ne nur praktika, sed ankaŭ simbola: ĝi estas paŝo al pli klara kaj pli facile uzebla spaco, kie ni povos pli bone organizi nian agadon.

Korajn dankojn al ĉiuj, kiuj venis por helpi. Via ĉeesto, via energio kaj via afableco faris diferencon.



☛ Ni tradukis konfidon!

Membroj de nia asocio tradukis unu konfeson el la libro *Les Confidences* (La Konfesoj) de la franca aŭtoro Marie Nimier. La aŭtoro estis kontaktita kaj ŝi konsentis kun ĝojo!

Marie Nimier Les confidences



Marie Nimier estas franca verkisto. Ŝia patro, Roger Nimier, ankaŭ estis verkisto. Li mortis kiam Marie estis infano. Ŝi verkis multajn rakontojn, kiuj estis tradukitaj en plurajn lingvojn: ekzemple en la anglan, japanan kaj vjetnaman. Ŝi ricevis multajn premiojn, en Francio kaj ankaŭ eksterlande. Marie Nimier verkis ankaŭ teatraĵojn kaj kantojn por famaj kantistoj, kiel Juliette Greco kaj Enzo Enzo.

Por la libro *Les Confidences*, ŝi havis specialan ideon. Ŝi invitis anonimajn homojn por rakonti ion intiman – konfeson. Ili estis ĉirkaŭ 15 volontuloj el malgranda urbo. Marie ne volis vidi iliajn vizaĝojn. Do ŝi ricevis ilin en blanka, nuda ĉambro, kun nur tablo, du seĝoj kaj verda planto. Ŝi havis kovritajn okulojn dum la konversacioj.

Poste, ŝi skribis la rakontojn, kiuj estas tre diversaj: kelkaj estas amuzaj, aliaj ŝokaj aŭ tre kortuŝaj.

Ni elektis unu el la plej kortuŝaj tekstoj, kaj tradukis ĝin en Esperanto. Tiu laboro estis kolektiva kaj tre emocia por ni ĉiuj.

<https://esperantolyon.org/2025/05/26/forjetindajoj-les-r ebuts/>

Julio - Augusto 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj membroj, karaj ĝemelaj kluboj kaj karaj legantoj,

La suno brilas, la tagoj longiĝas, kaj la somera spirito invitas nin al ripozo : do nia asocio prenos du-monatan feripauzon! Sed antaŭ ol fermi niajn librojn, ni kunplektis por vi specialan du-monatan eldonon de la Gazeto de Esperanto.

Ĉi tiu numero estas por ni aparte kara, ĉar ni publikigas ĝin kune kun nia itala ĝemela asocio el Milano. Tiu kunlaboro estas forta simbolo de nia interkultura amikeco, kiu atestas, ke Esperanto transpasas landlimojn kaj kunigas homojn en komunaj pasioj.

Malfermu la Gazeton senprokraste, kaj plenigu vian someron per inspiro kaj entuziasmo. Belegan someron al ĉiuj kaj ĝis revido en septembro, kiam ni denove aliĝos por plu komune malkovri la riĉecon de Esperanto!

Salutojn somerajn,

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ Retmesaĝo ricevita:

Saluton!!!

Mi estas Vilhelmo, kubano kaj estos en Liono ekde la 7a de julio.

Mi ŝatus renkonti geesperantistojn...

Amike,
Vilhelmo - vilhelmobessalazar@gmail.com

☛ Pikniko sub la tilioj - Marc-Olivier GRAZIANI

Dimanĉon la 22-an de junio ni faris belan piknikon en Liono. Ni ĝuis la freŝecon de grandaj tilioj kaj manĝis kune en amika etoso.

Poste ni ludis Mōlkky-on. Mi eĉ kreis programon por facile kalkuli la poentojn! Estis amuze kaj ĉiuj partoprenis kun ĝojo.

La plej bela surprizo de la tago estis la renkontiĝo kun Liĝia, brazilanino kiu loĝas kelkajn monatojn en Liono. Kia ĝojo konatiĝi kun ŝi!



Marc-Olivier - Maxime - Liĝia - Neil

☛ La Ambrozia Refektorio: Pontoj, Muroj kaj Homaj Defioj - Vilhelmo


La urbo Milano proponas multajn interesajn kulturajn eventojn kaj la interesitoj povas trovi ĉion kion ili povas ŝati.

Malbonŝance ofte tiuj kiel mi, kiuj ne havas multe da tempo pro laboraj aŭ familiaj devoj, perdas la plejparton de la eblecoj ĝui ĉi tiujn eventojn. Mi ne estas escepto al la regulo, sed kelkfoje mi povas eskapi el la malmilda realeco.

Unu inter tiuj bonŝancaj situacioj okazis kiam mi malkovris la vespermanĝojn en la Ambrozia Refektorio de Milano Greco. Ĉi tiu Refektorio estas katolika strukturo kiu dependas de la milana kurio kaj situas en la nordorienta kvartalo de Milano nomata Greco.

Ĉi tiu kvartalo estis antaŭe malgranda vilaĝo ekstere de la milana urbo, sed la ekspansio de la urbo finfine enprenis la vilaĝeton kiu nun estas tute ene de la urbo mem, sed daŭre konservas la strukturon de la lombardaj vilaĝetoj, kiu havis en la centro la placon de la preĝejo kaj ĉirkaŭe la malaltajn dometojn, tipajn de la agraraj vilaĝoj en la apudaĵoj de Milano.

La Ambrozia Refektorio troviĝas en granda domo tre proksima al la preĝejo kaj havas grandan manĝoĉambbron kun belaj lignaj tabloj. En ĉi tiu manĝoĉambro oni donas ĉiutage vespermanĝojn al personoj, ĉefe fremdaj enmigrintoj kaj maljunuloj, kiuj ne povas vivteniĝi per siaj propraj vivrimedoj.



La nutraĵoj kiun oni kuiras venas el la grandaj nutraĵaj superbazaroj de Milano, kiuj forĵetas ilin kiam ili preteras la limdaton por konsumado. Ĉiuj personoj kiuj agas kiel kelneroj, kuiristoj kaj purigistoj en la Ambrozia Refektorio estas volontuloj.

La Refektorio havas ankaŭ specialan tradicion kiu nomiĝas "Prenu libron kaj manĝu!": Je ĉiu dua monato ili proponas vespermanĝon en kiu dum la manĝado estas farita prezentado de libro kiu estas konsiderita ĉefverko. Pri la elekto de la libro kaj la prezentado okupiĝas pastro don Paolo Alliata, membro de la milana kurio kaj tre lerta profesoro pri literaturo.

Dum la prezentado la ĉeestantoj povas ankaŭ aŭskulti klasikajn muzikaĵojn ludatajn de flutistoj kaj violonistoj. La plej grava regulo kiun la aŭskultantoj devas respekti estas la malpermeso paroli dum la tuta vespermanĝo. Tio kreas vere strangan situacion pro kio en salono kun pli ol 100 personoj la solaj sonoj kiun vi povas aŭskulti, escepte la voĉon de la pastro kaj la muziko de la ludistoj, estas la tintadoj de manĝiloj sur teleroj.

Kompreneble la vespermanĝo ne estas senpaga, kiel okazas por la kutimaj uzantoj de la Refektorio. Je la fino de la vespermanĝo kaj de la prezentado la partoprenantoj lasas elirante anoniman koverton kun monofero ene. La sumo tiel kolektita estas asignata por pagi la vespermanĝojn de almenaŭ samnombro da kutimaj uzantoj de la Refektorio kaj por kovri la elspezojn de la Refektorio mem.

Mi partoprenis en la du lastaj renkontiĝoj “Prenu libron kaj manĝu!”. En la unua la prezentita libro estis “La sabatpago”, romano de la itala verkisto Beppe Fenoglio. En la dua la romano “La Regnoŝlosiloj” de la skota verkisto Archibald James Cronin.

Mi ne legis la unuan, kvankam mi legis aliajn romanojn de Beppe Fenoglio, kompanse mi legis la romanon de Cronin kiam mi estis tre juna kaj ĝi lasis en mi sufiĉe profundan impreson. Ambaŭ romanoj, tre bone prezentitaj de Don Paolo Alliata, kvankam tre malsamaj kiel tre malsamaj estis la du verkistoj, donis al mi temojn por pripensi.

La ĉefaj roluloj havis iomete similajn karakterizaĵojn, ĉar ambaŭ havis “ribelan naturon”, sed Pastro Chisholm havis malpli perfortan puŝon ol Ettore kaj pli bone trovis manieron por konformiĝi al la elprovadoj de la vivo kaj al la neceso obei al la ordonoj.

Mia persona taksado de la mesaĝo, kiun ambaŭ romanoj donas al ni, estas ke ni devas multe malfidi la utopiojn. Tio estas tre grava punkto ankaŭ por ni esperantistoj: nia lingvo kun sia interna ideo donas al ni iluzion ke ni povas vere detrui la “Murojn de miljaroj” kaj eble atingi la “Finan venkon”.

Male,, ĉi tiuj utopioj povas facile iĝi distopioj, kiel la fama artikolo kiun la ĉefo de la germanaj

esperantistoj verkis kaj titolis “Aŭskultu! Adolf Hitler parolis” bone klarigis al ni.


Ni revas kiel Ettore kaj pastro Chisholm atingi pli belan kaj justan mondon, sed la afero estas tre trompema por la esperantistoj. Ni vidas tion dum la nuna historia periodo, en kiu ĉiuj politikistoj paroladas pri paco kiel celo, sed ni povas facile kompreni ke ili havas vere malsamajn difinojn de ĉi tiu vorto.

Tio okazas ankaŭ por la esperanta ideo de paco, la ideo ke la homoj estas pretaj malfermi siajn brakojn al la aliaj homoj, sed tio estas ofte malfaciligata pro la bariloj kiuj dividas nin, ĉefe tiujn lingvajn.

Nia deziro estas detrui la “murojn de miljaroj”, sed fakte tiuj muroj estas multe pli fortikaj ol ni kredas, ĉar ili ne estas bazitaj sur niaj kulturaj aŭ naciaj aŭ religiaj malsamecoj, sed sur la profundaj difektoj de la homa naturo.

Beppe Fenoglio kaj Archibald J. Cronin montras klare kiel malfacile estas superi ĉi tiajn difektojn, ankaŭ por ribelaj karakteroj, kaj kiel facile ni falas en la demandon de la “eterogenezo de la celoj”, kiu turmentas la unuopajn homojn kaj ĉiujn iliajn sociajn utopiojn.

Kompreneble ni devas akcepti la demandon kaj ne tro iluziĝi pri la estonteco, sed eble, pripensi la nunan situacion de la movado post ĉirkaŭ 150 jaroj el ĝia naskiĝo, povas helpi nin trovi la taŭgan evoluon de niaj celoj en nova kontesto kiu montras klare al ni kiel la distreĉado inter nia persistanta besta esenco kaj nia kreskanta povo atingi la memdetruon de la “Infana raso” ne plu povas esti eltenita.



Mi lasas vin kun la bildo de la skulpturo de Mimmo Paladino antaŭ la Ambrozia Refektorio. La sola alia simila skulpturo de Mimmo Paladino estas montrata flanke, kaj trovigxas en la insulo Lampedusa por memori la elmigrintojn mortintajn dum traŭro de la Mediteraneo.



Certe, kiel verkis Roman Dobrzynski en la "Zamenhof-strato", nia ĉefa celo ŝajnas esti la konstruado de pontoj. Tamen, kiel pastro Chisholm bone sciis, la eniro en la Regnon ne okazas per ponto.

Anstataŭ, la Regno estas ĉirkaŭata de nepenetrebla muro, kaj en tiu muro la sola traŭro estas nur unu pordo, tre mallarga pordo.

☛ **Anekdotoj** - Thierry TAILHADES

Ni ĉiuj ofte bone memoras, kiam ni eklernis esperanton, ĉu ne? Sed ĉu vi memoras, kiam vi unuafoje aŭdis pri esperanto, unuafoje aŭdis la vorton?

Mi estis eble ok aŭ naŭ jara, kaj mi estis leganta bildstriojn. Ne demandu, pri kiu bildstrio temas, ĉar tion mi tute ne memoras!

En tiu bildstrio eksterteranoj ĵus alvenintaj sur nian teron, eliris el fluganta subtraso kaj demandis ion al la mirigitaj spektintoj de ilia surteriĝo. En la teksta veziko troviĝis strangaj desegnaĵoj, verŝajna reprezentado de ilia ekzotega lingvo. Kaj unu el la teranoj sin demandis: "Kio estas tiu volapuko?"

Mi, okjaraĝa, ne komprenis ankaŭ tiun vorton.

Mi do aliris al mia paĉjo kaj demandis lin, kion signifas "volapuko"? Kaj la patro, klera profesoro pri la franca lingvo, klarigis, ke temas pri artefarita lingvo, kiun neniu komprenas. Li plu diris, ke ekzistas aliaj, precipe iu, kiu nomiĝas esperanto, kaj iom similas la italan aŭ hispanan. (Mi ne komentu tion!)

Ankaŭ okazis, ke kelkajn monatojn poste veturante en suda Francio sub varmega somera suno, ni haltis por aĉeti kesteton de persikoj el vojrandada budo de fruktokultivisto. Kaj miaj akraj okuloj tuj trafis ŝildon, sur kiu estis skribita:

"English spoken, Se habla español, Esperanto parolata".

Mi tiam ne bezonis klarigon, kaj fieris pri tio.

Post kvar dek jaroj, mi fine lernis tiun lingvon, sed temas pri alia rakonto.

☛ **Ĉu vi estas reĝido?** - Marc-Olivier GRAZIANI

Multaj homoj pensas, ke esti reĝa posteulo estas io speciala. Sed surprizo: laŭ modernaj sciencaj studoj, preskaŭ ĉiuj eŭropanoj estas posteuloj de Karolo la Granda!

Kiu estis Karolo la Granda?

Karlo la Granda estis reĝo en la 8-a jarcento. Li konkeris multajn landojn kaj fondis grandan imperion. Li havis multajn infanojn – kaj kun sia edzino, kaj ankaŭ kun aliaj virinoj. Poste, liaj infanoj havis siajn infanojn, kaj tiel plu...

Kial preskaŭ ĉiuj estas liaj posteuloj?

Ĉar post pli ol 1000 jaroj, la familioj miksis sin. Se homo havis infanojn antaŭ 1000 jaroj, eblas ke multege da nuntempaj homoj havas lin en sia arbo genealogia.

Sciencistoj kiel Peter Ralph kaj Graham Coop montris: se vi havas eŭropan devenon, vi preskaŭ certe havas Karolo la Granda kiel prapatron. Ne unufoje, sed multfoje! Ĉar genealogia arbo kreskas kiel arbo kun multaj, multaj branĉoj... kiuj ofte rekuniĝas pro geedziĝoj inter parencoj (ekz. kuzoj).



Ĉu vi povas pruvi tion?

Nu... ne facile. Por pruvi, vi bezonus dokumentojn por ĉiu generacio dum 40 generacioj! Kaj DNA-testo ne sufiĉas por tio. Iuj retejoj kiel Geneall montras reĝajn devenojn, sed necesas esti pacienca detektivo.

Do, kvankam vi ne havas reĝan kronon hejme, vi verŝajne estas posteulo de Karolo la Granda. Tio ne donas al vi kastelon, sed montras ke ni ĉiuj estas pli interligitaj ol tio, kio ni pensas!

Kaj se iu diras al vi: "Mi havas noblan genealogion!" – vi povas respondi: "Ankaŭ mi!"

"Ni ĉiuj devenas de reĝo kaj ankaŭ de pendumito"
(Jean de La Bruyère)

☛ Graz Reviviĝas per Esperanto - FrancescoF



Ekde la 9a ĝis la 11a de Majo mi havis la eblecon partopreni, dank' al Erasmus+ projekto de BEA

(Bunta Esperanto-Asocio), en la Aŭstria Esperanto-Kongreso. Pasis jardekoj ekde kiam oni laste organizis aŭstrian kongreson, kaj tio igis la eventon eĉ pli grava kaj alloga por mi.

La kongreso okazis en la urbo Graz, ĉefurbo de Stirio, kaj vidis la partoprenon de kvardeko da esperantistoj, precipe el Aŭstrio, Germanio kaj aliaj apudaj landoj; la malfermo de la kongreso okazis posttagmeze vendredon la 9an, kun la salutvortoj de la urbestro de Graz kaj de aliaj lokaj aŭtoritatoj, aldone al tiuj de la ĉefaj organizantoj de la evento.

La programo de la kongreso estis aparte riĉa je prelegoj pri ĉiaj temoj: el la aktivaĵoj de la esperantistaj asocioj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj ĝis la kulturaj malsamecoj inter Eŭropo kaj Azio, el la rememoro de eminentaj scienculoj kiuj vivis kaj agadis en Graz ĝis la vivo kaj la verkoj de la nobelpremiito Bertha von Suttner. Ne mankis prelegoj pri lingvaj temoj, kiel tiu de Mireille Grosjean pri la *Rumantsch Grischun* (planlingvo enkondukita en Svislando kun la celo savi la lokajn romanĉajn lingvojn) kaj la prezento fare de Uli Ender de la statistikoj pri la diversaj tradukoj de la *Eta Princo*.



Krom la prelegoj, kiuj vidis grandan partoprenon de personoj, tre ŝatata parto de la programo estis ankaŭ la vesperaj aktivaĵoj, kun la engaĝigaj kantoj en Esperanto de la ĉeĥa grupo Šafrda kaj kun la koncerto de Gregor Markič.



Finfine, afero kiu allogis multajn homojn estis la urbo Graz mem, vere bela kaj riĉa kaj je monumentoj kaj je parkoj kaj historiaj anguloj nemaltrafeblaj.

👉 Paragvajo - Pascal FANTGAUTHIER

Paragvajo estis popolita de **Gvaranioj**, kiuj vivis per ĉasado, fiŝkaptado kaj plukado en la arbaro.

En 1521 unu eŭropa ekspedicio, gvidita de **Alejo García**, alvenis por esplori la regionon Paraguayo (en la nuna **Asunción**), sed ĝi estis forpelita de la indiĝenoj Gvaranioj.


Pli poste eŭropanoj koloniigis Asunción en 1537.



Por protekti la indiĝenojn Gvaranioj, sklaveco ne estis permesata al la eŭropaj bienuloj. Jezuitoj kreis la sistemon “**Reducciones**” aŭ “**Misiones**” de 1660 ĝis 1760. La “Misiones” havis arkitekturon kun la celo dissemiĝi la katolikan religion; ili proponis klasojn pri agrikulturo kaj medicino. La jezuitoj sukcesis konvinki la Gvaraniojn zorgi pri sia vivmaniero kaj sia religio. Ĉiu “**Misión**” estis fondita proksime al rivero kaj konstruita kun granda placo kaj preĝejo, ĉirkaŭataj de loĝdomoj por setlantoj kaj indiĝenoj. La jezuitoj nomis ilin “**Reducciones**”.

En referenco al la latina vorto *reducere* (“grupigi”), la jezuitoj grupigis loĝlokojn de indianoj por ilin evangelizi, alfabetigi, sen-nomadigi kaj eduki. La jezuitoj prizorgis la religiajn kaj administrajn aferojn. La indiĝenoj, disigitaj pro intertribaj konfliktoj, formis komunumojn kun propra praktiko.


La ekonomio estis komunuma: ĉiuj laboris duonan tempon por la familio kaj duonan tempon por la kolektivo. Edukado okazis en la lingvo **gvarania** per metodo bazita sur eŭropa kaj latina muziko. Lernado de muziko kaj kanto naskis la stilon “**Baroque Guaraní**”. Bienuloj malkontentiĝis, ĉar ili jam ne havis rajton dungi malmultekostan laboron. La reĝoj de Hispanio kaj Portugalio elpelis la jezuitojn en 1764.



Post la sendependeco de Hispanio en 1811 Paragvajo devis alfronti la **Militon de la Triopa Alianco** (1865-1870) kontraŭ Argentino, Brazilo kaj Urugvajo, subtenataj de Anglio.

En tiu epoko, sub la influo de **Gonzalo López**, la lando komencis industriiĝi: oni starigis fandegojn kaj bonan fervojan reton. Produktaĵoj celis ankaŭ la usonan merkaton, kaj tio vekis la intereson de Anglio, kiu finfine deklaris militon por akiri novajn teknologiojn.

La milito finiĝis per la malvenko de Paragvajo, kiu devis cedi parton de sia teritorio al Brazilo kaj Argentino. Paraguay perdis la duonon de sia loĝantaro.



- Fotografioj: arkeologia loko de Trinidad, “**Misión jesuita**” (UNESCO), indiĝenoj Guarani, akvofaloj de **Iguazú**.

Poste okazis la **Milito de Chaco** kontraŭ Bolivio (1932-1935), kaj poste la longa diktatoreco de generalo **Stroessner** (1954-1989), kio malfortigis la identecon de la lando.

Paragvajo landlimas kun Bolivio norde kaj kun Argentino kaj Brazilo sude. Ĝi estas preskaŭ senelira lando, benita de du grandaj riveroj: Río Paraguay kaj Río Paraná. La lando vivas ĉefe el agrikulturo, kun la kultivado de sojo kiel ĉefa fonto de enspezoj. Oni kultivas ankaŭ maizon, kaj sukerkanon.

Bovbredado evoluas malproksime de la Amazono, kaj produktadoj komencas en Argentino.

La ŝtata plado estas “**chipa**”, malgranda ronda pano el manioko kaj fromaĝo; la ŝtata trinkaĵo estas “**mate**”, metita en ujo el kara metalo aŭ zinko. Oni infuzas foliojn de mate—eta arbusto kun forta gusto—laŭ dudeko da metodoj.

Paragvajanoj ĝuas la riĉecon de mateo (kultivado, fabrikado de lignaj kalabaso-ujojn) kaj de muziko (la harpo estas ilia preferata instrumento). Tiel naskiĝis miksaĵo inter la “klasika” eŭropa tradicio, alportita de la jezuitoj, kaj la sentemo **guarani**.

Pro la malfacileco vojaĝi en la lando (malfacileco por atingi turismajn lokojn) oni rekomendas la solan vojaĝagenton kiu organizas rondirojn en la lando, konceptitan por la gvarania kulturo: **Nomade Aventure**, tel. 04 72 44 13 50.

- Por eltrovi **mate** kaj **chipa** vizitu la trinkejon *La Umina*, 69 rue Salomon Reinach, **Lyon 8e** — mardo ĝis dimanĉo 9 h – 18 h.

☛ **Libro** : « **La maljunulino kiu marŝis en la maro** » - Anita BASTRENTA

Sinjorino M. estas maljuna virino, tiel riĉa kiel ekstravaganca. Ŝi ŝuldas sian riĉaĵon al diversaj trompoj, kiujn ŝi faris kun Pompilius, maljuna diplomato de rumana deveno. Sed iun tagon, en marborda feriejo, ŝi kaptiĝas en sia propra kaptilo kiam juna trejnisto ŝtelas de ŝi juvelon. Ŝi tuj decidas fari lin sia lernanto kaj instrui al li ĉiujn ruzojn de la metio antaŭ ol malaperi. Ili entreprenos sian lastan grandan trukon: ŝteli tiaron de riĉa araba princo.

Aŭtoro : Frédéric Dard

Frédéric Dard (1921–2000) estis franca verkisto, ĉefe konata pro la aventuroj de komisaro San Antonio, helpata de lia asistanto Bérurier.

Li loĝis en Liono, en la kvartalo Croix-Rousse, poste en Svislando. Li estas entombigita en la tombejo de Saint-Chef en Dauphiné (Izero), vilaĝo kie li vivis kiel infano. En Saint-Chef, muzeo estas parte dediĉita al lia verkaro, kaj ankaŭ statuo de la skulptisto Philippe Geluck omaĝas lin.

Okazaĵo : Sango por Sango Polar

Ĉiujare dum la pasintaj 15 jaroj, komence de junio, ĉe la datreveno de lia morto, lia filino Joséphine kaj la asocio Sango por Sango Polar organizas salonon por antaŭenigi krimliteraturon. Aŭtoroj kaj volontuloj bonvenigas ĉiam pli multajn vizitantojn en amika kaj vigla etoso.

<https://sangpoursangpolar.com/>



☛ Mia vojaĝo per la vapora trajno "Mastrou" en Ardeĉo - Marc-Olivier GRAZIANI

Mi faris mirindan vojaĝon per malnova vapora trajno en Ardeĉo, en la sudo de Francio. La trajno nomiĝas "Le Mastrou". Ĝi iras de Tournon-Saint-Jean ĝis Lamastre, tra belaj montoj kaj profundaĵoj nomataj Gorges du Doux.



La trajno ne estas kiel modernaj trajnoj. Ĝi estas tre malnova, kun lignaj seĝoj, vapormaŝino, kajodoro de oleo kaj karbo. Mi sidis en la vagono kaj tuj sentis min kvazaŭ en alia jarcento.




La lokomotivo estas Mallet-lokomotivo, konstruita antaŭ pli ol cent jaroj. Ĝi uzas multe da karbo kaj akvo: ĝis 700 kg da karbo kaj pli ol 4 000 litroj da akvo por unu vojaĝo! Mi ricevis nigrajn punktojn de karbo sur mia vesto – sed tio estis parto de la sperto!



La trajno moviĝas malrapide, nur je 25 km/h, tiel ke ni havis tempon spekti la pejzaĝon. Ni trapasis tunelojn, pontojn, kaj viaduktojn, kiel la fama Viaduc de Troye kaj la Pont des Soupîrs. Ĉio estis tiel impona!

La Gorges du Doux estas tre apartaj – oni ne povas facile alveni tien per vojo aŭ aŭto. Do, vidi ilin per trajno estis unika sperto. Mi rigardis la riveron, la verdajn montojn, la rokojn... Tio estis kvazaŭ sonĝo.

Ĉe la fino de la vojaĝo, mi sentis min feliĉa kaj laca – sed tre kontenta. Se vi volas sperti vojaĝon tra la tempo, mi vere rekomendas la trajnon Mastrou en Ardeĉo.



☛ **La magia lingvo** - Aldo Foa' tiam prezidanto de la Milana Esperanto-Klubo

Dum mi estis revenanta al Milano post partopreno en UK, mi ricevis mesaĝon kiu informis min pri invito al vespermanĝo, kiun faris grupo da japanoj (ankaŭ revenantaj el la Kongreso) al la milanaj esperantistoj en restoracio en la centro de Milano, apud la hotelo kie ili loĝis. Ili decidis halti kelkajn tagojn en Italujo por vizitoj.

La invito por partopreni estis direktita ankaŭ al mi, kiu tiam estis vicprezidanto de la milana Esperanto-Klubo. Do tuj post la atingo de la milana stacidomo, mi iris al la elektita restoracio. Tie mi trovis la aliajn milanajn samideanojn kaj la novajn japanajn samideanajn geamikojn, iom junajn kaj iom maljunajn.

Post salutoj kaj mendo de la manĝaĵo, oni proponis ke ĉiu italo kaj ĉiu japano ekstaru laŭvice, por ke ĉiu povu prezenti sin al la aliaj per mallonga parolado en Esperanto. Kaj tiel estis farita. Rimarkinte la ĉeeston de multaj junaj japanoj kaj multaj junaj japaninoj, mi bondeziris bonan estontecon por Esperanto en niaj respektivaj landoj, subtenata de la junularo.

La vespero pludaŭris tre agrable per interparolado en Esperanto inter najbaroj japanaj kaj italaj, per tre bongusta itala kuirarto kaj kelkaj tosto(j).

Je la fino de la vespero, alproksimiĝis al mi ĉefkelnero, kiu diris al mi:

“Ĉiutage venas al nia restoracio grupoj da homoj el la tuta mondo, kaj ni kelnero klopodas kompreni, parte laŭ aspekto de la kliento kaj parte per la lingvo, el kiu lando ili venas, kaj ni vetas inter ni; sed ĉi-foje ni ne komprenis. Ni vidis, ke tre malsamaj homoj trankvile interparolis en nekonata lingvo. Ĉu vi volas klarigi, kian (magian) lingvon vi parolas?”

☛ **La Feo-Roko: loko de historio kaj legendo** - Anita BASTRENTA

Saluton, mi estas la Feo Mélusine kaj mi rakontos al vi la historion de unu el la plej gravaj megalitaj monumentoj en Francio (ĉirkaŭ 2000 jarojn antaŭ nia epoko): la Feo-Roko.

Situanta en Norda Bretonio, okcidente de Essé, ĉi tiu portika dolmeno estas la plej granda kovrita

pasejo en Francio, mezuranta 19 metrojn longe, 6 metrojn larĝe, kaj enhavanta 41 verdajn skistajn slabojn, el kiuj kelkaj pezas pli ol 40 tunojn. Entute 800 tunoj da ŝtono estis necesaj por konstrui ĝin.

La Feo-Roko estas kolektiva tombo; enireja portiko antaŭas la ĉefan tomboĉambron, kiu frontas sudorienten. Nur en la tago de la vintra solstico (la 21-an de decembro) la suno, sub iaj kondiĉoj, penetras ĝis la fundo de la monumento kaj lumigas specifan punkton sur la tomboŝtono.

La ŝtonoj venis de ŝtonminejo 4 kilometrojn for. La viroj devis ruli ilin sur lignajn ŝtipojn kaj superi altecdiferencon de pli ol 200 metroj! Almenaŭ 10 viroj estis bezonataj por transporti la blokojn kaj 14 por starigi ilin.

Jen bona rido, Ni, la Feoj!!!

La vera rakonto estas tute alia. Ni honoras la mortojn, kiuj praktikis "Bonon" dum siaj vivoj, kaj por iliaj entombigoj ni konstruas por ili nedetrueblajn kavernojn, kien ni venas nokte por paroli al ili.

Tial ni konstruis la Feo-Rokon!



Ni dividis la laboron. Dum kelkaj feoj ŝarĝis la grandajn blokojn en siajn magiajn antaŭtukojn, aliaj starigis la monumenton! Tutsimple!

En iuj ventaj noktoj, vi povas aŭdi nin flustri kun la mortintoj... Kondiĉe ke vi estas bonvola!



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir ! Nouvelle formule.

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoro: Anita BASTRENTA,
Pascal FANTGAUTHIER,
Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

La kursoj rekomenciĝis!

La nova lerna jaro komenciĝis bone ĉe *Espéranto Lyon!*

La kursoj por komencantoj jam rekomenciĝis, kaj ankaŭ tiuj por progresantoj, kiuj okazas ĵaŭde. Tiun grupon gvidas Andrea, helpata de Conny, germana esperantisto, kaj Jérôme, tre aktiva membro de nia bela asocio.

Por la komencantoj, ni planas malgrandajn ekzamenojn fine de oktobro aŭ komence de novembro. Ili helpas al ĉiuj resti motivitaj kaj havi klaran celon.

Ni ankaŭ reeldonas la gazeton!

Bedaŭrinde, septembre ĝi ne aperis pro manko de tempo. Mi pensis pri la graveco havi gazeton: malsame ol blogoj aŭ sociaj retoj, gazeto restas, oni povas ĝin konservi kiel arkivo. Ĝi estas ankaŭ dokumento, kie ĉiu povas lasi sian spuron, libere esprimi sin, aŭ simple progresi en Esperanto.

Do, partoprenu en la gazeto! Ĉiu montato, ni atendas viajn tekstojn, ideojn aŭ spertojn.

"Ĝis Cent!" signifas ankaŭ la deziron atingi **100 artikolojn en unu jaro!**

Ne temas nur pri nombro da membroj, sed pri la viveco de nia komunumo!

Ĝis baldaŭ en la kursoj aŭ en la paĝoj de nia gazeto!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ Vojaĝo tra la orienta bordo de Usono - Pascal FANTGAUTHIER

Mi laŭiris la orientan marbordon de Usono per trajno de Nov-Orleano ĝis Bostono. Trajno estas pli bona maniero por vidi la pejzaĝojn: ĝi estas malrapida kaj oportuna, kun sufiĉe da tempo por rigardi ĉirkaŭe.

Nov-Orleano estas la naskiĝloko de ĵazo, kaj ĝia plej fama muzikisto estas Louis Armstrong. En la malnova franca kvartalo mi aŭdis homojn ludi ĵazon kaj veturis sur la Misisipo per boato.



La vizito en la *bayou* estis tre interesa pro la kurbiĝanta rivero de la Misisipo, kie oni povas vidi aligatorojn. Oni ankaŭ povas viziti malnovajn plantejojn el la tempo de sklaveco, vere interesa sperto.



Atlanto ne estas tre bela urbo; ĝia ĉefa vidindaĵo estas la muzeo pri Martin Luther King. Tie oni povas vidi la naskiĝdomon de la pastro kaj de lia patro, kaj ekscii kiel li komencis sian pastran vivon kaj sian faman agadon.

Charlotte estas moderna urbo kun altaj konstruaĵoj kaj muzeo pri veturiloj. Norda Karolino estas konata pro sia aŭtoindustrio.


Mi ne ŝatis Vaŝingtonon; mi pli ŝatis la pli

malgrandan kaj agrablan urbon Annapolis, kun anglostilaj domoj el la jaroj 1900-aj.

Novjorko memorigis al mi usonajn romanojn kaj la televidserion *Castle*. Sur la orienta marbordo la plej bela kaj agrabla urbo estas Bostono, kun sia universitato Harvard kaj sia malnova kvartalo.



☛ Kalejdoskopio - Anita BASTRENTA



Kalejdoskopio estas optika ilo, kiu reflektas eksteran lumon senfine kaj per koloroj.

La rigardanto vidas tra unu flanko de la tubo, dum lumo eniras tra la alia kaj reflektiĝas en la internaj speguloj.

La nomo de ĉi tiu ludilo venas de tri grekaj vortoj: **kalós** "bela", **eîdos** "bildo", kaj **skopéō** "rigardi".

Kelkaj modeloj enhavas moviĝantajn pecojn de kolora vitro aŭ vezikojn, kiuj moviĝante en la tubo, kreas senfinajn kombinaĵojn de belaj bildoj.

La skota fizikisto Sir David Brewster elpensis la kalejdoskopon en 1816 dum li faris provojn pri la polarigo de lumo.

Ĝi estis registrita kiel patento la 27-an de aprilo 1818 de Winsor kaj la 29-an de majo 1818 de Alphonse Giroux.

En la 19-a jarcento, la kalejdoskopo estis scienca ludilo en optikaj katalogoj, aŭ ilo por sorĉado aŭ eĉ por blanka magio. Ĝi estis tre laŭmoda en salonoj.


Nuntempe ekzistas nur unu faranto kaj kreinto en Eŭropo: Dominic Stora.

Ekde 1977, en sia laborejo en Beaumont-en-Auge, proksime de Pont-l'Évêque (Calvados), li faras tute manfaritajn kalejdoskopojn el bonkvalitaj materialoj.

Lia butikoj **"Post la Pluvo"** ankaŭ vendas kopiojn de malnovaj optikaj ludiloj.

Por scivolemuloj, jen lia retejo: www.kalejdoskopesfrance.com


La ĉarmo de kalejdoskopo estas, ke oni neniam vidas la saman bildon dufoje: ĝi montras senfinajn imagajn florojn, kiuj invitas al trankvila rigardado.



☛ **Libro, aŭtoro, loko: Jules Verne, esperantisto, Maison Jules Verne, Amiens, Francio - Anita BASTRENTA**

Ĉi tiu libro rakontas kial kaj kiel Jules Verne interesiĝis pri Esperanto, ĝis la punkto fari ĝin la

ĉefa temo de lia lasta libro, kiu bedaŭrinde restis nefinita: **"Studvojaĝo"**.



Aŭtoro: Jules Verne

Dum sia tuta vivo Jules Verne estis scivola kaj malfermita al ĉiuj formoj de progreso. Tiuj ideoj aperas en multaj el liaj romanoj. Fine de sia vivo li ekinteresiĝis pri Esperanto.

En 1903 li aliĝis al la esperantista grupo de Amiens kaj fariĝis ĝia honora prezidanto. Tiam li promesis verki romanon, kiu laŭdos Esperanton: **"Studvojaĝo"**.

En **"Studvojaĝo"**, la ĉefrolulo Nicolas Vanof diras: *"Esperanto estas la plej sekura kaj plej rapida ilo de civilizo."*

Jules Verne malsaniĝis kaj mortis antaŭ ol li povis fini la rakonton.

Li diris: *"Lerni Esperanton ne estas malfacile por la buŝo aŭ por la memoro. Oni lernas ĝin tiel facile, kiel oni spiras."*

Loko: la domo de Jules Verne en Amiens (Francio)

Ĉe **2, strato Charles-Dubois** en Amiens troviĝas la domo, kie Jules Verne loĝis de 1882 ĝis 1900. Oni nomas ĝin ankaŭ **"la turdomo"**, kaj tie estas muzeo pri la vivo, verkoj kaj publika agado de la verkisto. Jules Verne verkis pli ol tridek romanojn en tiu domo.

La domo de Jules Verne estas unu el la plej belaj verkistaj domoj en Eŭropo.



Novembro 2025

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00

Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com

Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir ! Nouvelle formule.

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de
Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: André DELORME -
Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

La aliĝoj al nia asocio estas malfermitaj!

La nova lerna jaro komenciĝis, kaj nia asocio denove malfermas siajn aliĝojn. Dank'al via subteno, niaj agadoj multiĝas jaron post jaro : kursoj, renkontiĝoj, kulturaj eventoj, projektoj por la disvastigo de Esperanto... kaj ĉiu jaro alportas novajn ideojn kaj novajn partoprenantojn.

Nia asocio kreskas, sed por daŭrigi tiun vojon ni bezonas vin.

Aliĝinte, vi ne nur ricevas informojn kaj aliron al ĉiuj niaj agadoj, sed vi ankaŭ helpas nin konservi viva la spiriton de kunlaboro kaj internacia amikeco.


Aliĝu aŭ renovigu vian membrecon hodiaŭ – via partopreno estas la plej bela subteno por nia laboro kaj por la estonteco de Esperanto en nia regiono.

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI



☛ La legendo pri Leonardo kaj la ŝtuparo de Šambordo - Marc-Olivier GRAZIANI

Mi havis la ŝancon viziti la kastelon de Chambord dum miaj ferioj. Ĝi estas grandega kaj belega konstruaĵo meze de la naturo. Dum mia vizito mi ankaŭ grimpis la faman duoblan ŝtuparon, kiu estas tre kurioza: oni povas supreniri sen renkonti la personon, kiu malsupreniras. Tiu sperto estis tre impresa !



Poste mi volis scii pli, kaj mi malkovris, ke la ideo pri Leonardo da Vinĉi kaj tiu ŝtuparo estas nur legendo... Oni ofte diras, ke Leonardo da Vinĉi kreis la grandan duoblan ŝtuparon de la kastelo de Chambord. Tamen tio ne estas vero. Estas nur bela legendo.

Ekzistas neniu dokumento de tiu tempo kiu diras, ke Leonardo faris la planon de la kastelo aŭ de la ŝtuparo. Li jam estis morta kiam oni komencis konstrui la kastelon en la jaro 1519. Eble li donis ideojn al la reĝo Francisko la 1-a, sed li ne povis esti la arkitekto.

La duobla ŝtuparo mem ne estis io nova. En Francio, oni jam konstruis multajn tiajn ŝtuparojn. Tio estis franca specialaĵo, kiun oni eksportis al aliaj landoj en Eŭropo. Tiutempe, francaj arkitektoj estis tre serĉataj, ĉar ilia stilo kaj ilia tekniko estis tre admirataj.

Do, diri ke Leonardo faris la ŝtuparon estas bela legendo, sed ne fakto. La ŝtuparo de Chambord estis kreita de la franca renesanco, farita de talentaj homoj, kaj ĝi estas mirinda eĉ sen la nomo de Leonardo da Vinĉi.

☛ Kiam Malraux igis ĉiujn rigardi supren : la plafono de Chagall en la Operejo Garnier - Marc-Olivier GRAZIANI

En la jaro 1964, la urbo Parizo rigardis supren. Ĉe la plafono de la Operejo Garnier, aperis nova mirindaĵo : granda pentraĵo de Marc Chagall.

Anstataŭ la malnova klasika bildo, oni vidis multajn kolorojn : ruĝon, verdon, flavon, bluan... Kiel sonĝo super la kapoj de la spektantoj, respektante la plurkolorajn marmorojn.

Tiu ideo venis de André Malraux, tiam ministro pri kulturo en Francio. Li volis, ke la operejo denove fariĝu interesa por la publiko. Multaj homoj ne venis plu al la spektakloj : la loko estis tro malnova, tro serioza. Malraux pensis, ke nova arto povus doni al ĝi freŝan vivon.

Li do invitis la faman pentriston Marc Chagall.

Chagall pentris la plafonon sur grandaj toloj, kiuj poste estis fiksitaj sub la kupolo. La malnova plafono de la pentristo Lenepveu ne estis forigita : ĝi restas kaŝita malantaŭ la nova. La nova kupolo estis montrita al la publiko la 23-an de septembro 1964.

Sur ĝi oni vidas muzikistojn, dancistojn, kaj la grandajn komponistojn : Mozart, Wagner, Berlioz, Rameau, Stravinsky... Ĉio ŝajnas flugi kaj kanti.

Hodiaŭ, la plafono de Chagall estas unu el la plej famaj partoj de la Operejo Garnier.



☛ **Telelaboro : aktualaj aferoj, kialoj kaj sekvoj**
- André DELORME



Ĉi tiu labormaniero plivastiĝis ekde la eventoj rezultantaj de COVID. Nuntempe, ni vidas paŝon malantaŭen en Usono !

La interreta podetala giganto ordonis ĉesigi telelaboron por siaj dungitoj, almenaŭ sur usona grundo.

La epidemio disvastiĝis al aliaj kompanioj, kiel Apple kaj franca videoluda giganto, kiu, sen konsulto, volas trudi tri tagojn da surloka tempo semajne al siaj dungitoj, traktado malbone akceptita de la koncernataj dungitoj.

Dum fizika distanciĝo povas esti utila en certaj sanitaraj kunteksto, pri laborado, bedaŭrinde tio, kion ĝi emas malhelpi, estas la disvastiĝo de kreivo kaj la kontaĝo de instigo. Luj gvidantoj de administrado emfazas la gravecon kunlabori en la sama spaco, krom cifereca spaco aŭ komuna interreta spaco.

Konvinkitaj telelaboristoj argumentos, ke cerboŝtormaj sesioj povas esti faritaj per videokonferenco, kaj ke la sano de hibridaj organizoj dependas de la evoluo de novaj profesiaj kapabloj kaj scipovo.

Fora laboro, kiun kelkaj homoj konsideras kunlaboro kun familio, ankaŭ havas avantaĝojn por entreprenoj : kelkaj povis redukti sian nemoveblan spacon danke al fleksebla oficeja kunhavigo.


Ĉu telelaboro estas faktoro de izolado kaj profesia enuo aŭ rimedo kontraŭ elĉerpiĝo-sindromo, ĉi tiu nova malsano de la jarcento ?

☛ **Saturno ĉe opozicio... sed oni apenaŭ vidas ĝiajn ringojn** - Marc-Olivier GRAZIANI

Planedo estas je opozicio, kiam la Tero estas inter la Suno kaj la planedo. Tiam la planedo estas tre bone videbla dum la nokto: ĝi leviĝas kiam la Suno malleviĝas. Saturno nun estas je opozicio, do ĝi estas tre hela kaj facile videbla.

Sed kial oni ne vidas la ringojn? Saturno havas grandajn kaj belajn ringojn, sed nun ni vidas ilin preskaŭ deflanke, tial ili aspektas preskaŭ nevideblaj. La ringoj estas tre larĝaj, je centmiloj da kilometroj, sed ili estas dikaj nur je 10 ĝis 100 metroj! Se oni vidas ilin deflanke, oni preskaŭ ne povas vidi ilin.

Do nun, kvankam Saturno estas tre hele en la ĉielo kaj videbla la tutan nokton, ĝiaj ringoj ŝajnas malaperi. Ili tamen estas tie, nur nia rigardo ne montras ilin bone. Saturno do restas bela kaj mistera, eĉ kiam ĝi ŝajnas nuda.





KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir ! Nouvelle formule.

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de
Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Marc-Olivier
GRAZIANI -

ANTAŬPAROLO

Novaj Novaĵoj, Novaj Demandoj!

Ĉi tiu monato novembra ne estis trankviliga por ni. En Eŭropo kaj en Francio la novaĵoj ofte estis pezaj, kun multaj mesaĝoj kiuj ne helpas senti nin sekuraj. Estis malfacile resti tute trankvila.

Dum la semajnoj tri aferoj en la amaskomunikiloj vere atentigis min. Ili montras la nunan situacion kaj igas nin pensi pri nia rolo en la mondo. En ĉi tiu gazeto mi proponas, ke ni kune rigardu tiujn tri aferojn tra du artikolojn kaj komprenu kial ili gravas.

La celo ne estas esti pesimismaj, sed simple preni iom da tempo por pripensi la signifon de tiuj novaĵoj por ni kaj por nia asocio.

Kaj fine, ni jam preparas la Feston de Esperanto, kiu okazos dimanĉe la 14-an de decembro. Ni esperas vin tie, por momentoj de renkontiĝo kaj ĝojo.

Bonan legadon al ĉiuj.

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ **Kogna milito, kiam niaj mensoj fariĝas teritorio por konkero** - Marc-Olivier GRAZIANI

Dum kelkaj jaroj oni pli kaj pli parolas pri “kogna milito”. Tio signifas silentan kaj kaŝitan konflikton, kie la celo ne estas nur venki batalojn aŭ kontroli merkatojn, sed eniri rekte en la mensojn de homoj.

La esperantista movado konas la efikojn de kultura hegemonio, sed ĉi-teme la danĝero estas multe pli forta. La celo estas influi kondutojn, kutimojn kaj decidojn de individuoj kaj de tuta socio.

1. La fabrikado de mensoj: unu ilo, du mondoj

La franca prezidanto diris du tre interesajn aferojn. Ne temas ĉi tie pri juĝi lian politikan agadon, sed pri trakti serioze la konstatojn kiujn li prezentas, ĉar ili rilatas al granda fenomeno jam komenciĝinta.

Jen la unua pri Ĉinio:

« Ilia TikTok tute ne similas al nia TikTok. Ĝi havas limigitan tempon de uzo, kaj estas plena je pedagogia enhavo por infanoj.

Ni, male, estas la stultuloj en la mezo, dirante: jen, junuloj, manĝu tion. Ili mem ne “manĝas” tion hejme, sed ili eksportas ĝin al ni. »

Malgraŭ la forta tono, la fakto estas klara:

- Luj landoj protektas siajn junulojn per striktaj reguloj kaj montras enhavon kun edukaj celoj.
- Aliaj landoj lasas infanojn spekti senfinan fluron de tre mallongaj, emociaj kaj tre allogaj enhavoj.

La rezulto:

Kogna dependeco fariĝas eksporta produkto. Ĝi malfortigas atenton, koncentriĝon kaj kritikan pensadon. Estas kvazaŭ armeo sen uniformoj, kiu celas simple satiri la cerbojn.

Ne temas nur pri propaganda enhavo.

Temas pri nova formo de konflikto, kie unu lando povas fortigi siajn junulojn dum la junuloj de aliaj landoj perdas tempon kaj energion en senfinaj filmetoj.

2. La persona asistanto, kiu voĉdonas por vi

La dua averto de Macron temas pri konversaciaj artefaritaj inteligentoj, ekzemple ChatGPT:

« En la venontaj urbaj elektoj, en la venontaj prezidant-elektoj, mi diru al vi kio okazos. Pli kaj pli da samlandanoj iros al sia IA-agento kaj demandas: “Por kiu mi devas voĉdoni?”

Mi ne scias kion ChatGPT rekomendos, sed la interesoj malantaŭ ĝi ne estos neŭtralaj, nek nepre kongruaj kun tiuj de Francio. »

Ĉi tio jam ne estas sciencfikcio.

Multegaj homoj jam demandas al IA: kion pensi pri filmo, libro, argumento aŭ konflikto. Morgaŭ ili demandas ankaŭ por kiu voĉdoni. La danĝero ne estas nur influo.

La vera danĝero estas kiam la homo ĉesas juĝi mem, pensi mem.

IA neniam estas tute neŭtrala.

Ĝi estas gastigita ie.

Ĝi estas agordita de iu.

Ĝi estas financata de industrioj.

Ĝi havas proprajn biasojn.

Se ni lasas IA decidi politike, ni perdas nian intelektan suverenecon.

Tio signifas eniri eksteran forton en la plej personan spacon: la spaco kie oni decidas pri la estonteco de sia lando.

3. Kogna koloniado

Kultura aŭ lingva hegemonio jam estis formo de potenco. Sed nun ni estas je alia nivelo.

La koloniado de la 21-a jarcento ne estas teritoria, ne estas milita, ne estas kultura en la klasika senco.

Ĝi estas ankaŭ kogna.

Ĝi celas:

- fari miliardojn da homoj dependaj de tre rapidaj informfluoj,
- ŝanĝi la kapablon koncentriĝi,
- influi kiel oni perceptas faktojn,
- gvidi kolektivajn emociojn,

- aŭtomatigi opiniojn,
- kaj, iom post iom, pensi anstataŭ la homo mem.

Klasika imperio konkeris terojn. Cifereca imperio konkeras cerbojn.

4. Repreni la kontrolon

Kogna milito ne estas venkebla per cenzuro aŭ timo. Ni povas kontraŭi ĝin per vigleco, edukado kaj kompreno.

Civitanoj devas havi: bazan ciferecan kulturon, kritikan pensadon, demokratian kontrolon pri teknologioj.

Se ni ne protektas nin mem, aliaj faros tion anstataŭ ni. Ni devas resti aktivaj en nia pensado, lernado kaj kreado. Tio estas parto de nia hejmo.

La kognita milito jam ekzistas. Ĝi estas ĉiutaga. Ni nur bezonas rigardi nian rilaton al poŝtelefonoj. La aplikoj kaj la IA-oj kiujn ni uzas ne estas neŭtralaj. Ili formas nian vidmanieron pri la mondo, pri vero, pri politiko, pri la aliaj.

La afero temas pri nenio malpli ol nia libereco kaj nia hejmo.

5. Konkludo pri Esperanto

Mi verkis tiujn elementojn en antaŭa bulteno. Mi demandis al mi: kial lerni Esperanton en la epoko de artefarita inteligenteco?

ENERGIO Por krei enhavon per artefarita inteligenteco oni bezonas multe da energio. Kaj poste oni ankaŭ bezonas baterion por uzi la aparaton.

LIBERECO Kiam vi dependas de teknologio, vi dependas de sistemo.

Foje ekzistas kaŝitaj aŭ malkaŝitaj formoj de cenzuro, kiuj povas malhelpi aŭ ŝanĝi informojn.

ALIREBLECO Traduksistemoj ne estas disponeblaj por ĉiuj homoj en la mondo. Ili estas pli ofte uzeblaj en riĉaj kaj evoluintaj landoj.

CERBO Lerni lingvon helpas la cerbon. Ĝi plibonigas memoron, koncentriĝon kaj komprenon. Esperanto helpas ankaŭ por lerni aliajn lingvojn.

NEŬTRALECO Esperanto estas neŭtrala lingvo. Ĝi ne estas la lingvo de unu popolo aŭ unu lando. Ĝi helpas protekti naciajn lingvojn kaj lokajn dialektojn.

FACILECO Ne ĉiuj havas la saman facilon por lerni lingvojn. Esperanto helpas al ĉiuj komenci lerni lingvon, ne nur al homoj kun altaj studoj.

VALORO Esperanto enhavas ideon pri interkultura kompreno, pri aŭskulto kaj pri paco.

INTERAGO Estas ĝojo paroli rekte kun persono, sen elektronika aparato. Per Esperanto vi povas paroli kun la tutmonda komunumo rekte.

► La malfacila limo inter atento, diplomatio kaj arma influo - Marc-Olivier GRAZIANI

La lastaj vortoj de la ĉefo de la francaj armeoj, Fabien Mandon, vekis multe da timoj.

Li diris:

« Se nia lando rezignas ĉar ĝi ne pretas akcepti la perdon de siaj infanoj, kaj ĉar la prioritatoj iros al defenda produktado, tiam ni estas en danĝero. »

La internacia situacio estas streĉa. Ekzistas veraj minacoj, foje malfortaj, foje tre klaraj. Sed rekoni la danĝeron ne signifas ke oni ne rajtas pensi pli vaste pri tio, kiel tiuj riskoj aperas kaj kreskas.



Reala minaco, sed ankaŭ signo de malsukceso

Arma minaco neniam aperas el nenio. Ĝi estas rezulto de longaj procezoj: geopolitikaj konfliktoj, diplomaciaj eraroj, malbonaj decidoj, strategiaj rezignoj.

Diri al la loĝantaro, ke la lando devas prepariĝi al homaj perdoj, estas grava mesaĝo. Ĝi montras la epokon, sed ankaŭ tion, kion oni ne sukcesis fari pli frue.

En demokratio, rekoni danĝeron ne sufiĉas. Oni devas ankaŭ demandi sin kial la situacio tiel malboniĝis.

La armeo en la historio de Francio

La franca armeo ne estas institucio kiel la aliaj. Ĝi estas forta korpo en la historio de la lando. Foje ĝi stabiligas, foje ĝi puŝas, foje ĝi timigas. Ĝia simbolo kaj ĝia influo estas tre grandaj.

Estas normala, ke ĝi avertas pri estontaj riskoj. Sed estas malpli normala, ke ĝi formulu longdaŭran politikan filozofion. La civitanoj devas aŭskulti la fakulojn, sed samtempe ne lasi la tutan landon organiziĝi nur ĉirkaŭ sekureca logiko.

De kie venas la decidoj?

Demandi pri la origino de strategiaj decidoj ne estas malpatriota. Tio estas demokrata devo. Francio vivas en sistemo de internaciaj aliancoj. Tiuj aliancoj, premoj kaj dependecoj influas la elektojn. Se oni postulas oferojn nome de tiuj aliancoj, tio leviĝas gravajn demandojn: Kiom malproksimen iri? Kiu decidas la prioritatojn? Por kiu oni postulas tiujn oferojn?

Ĉu prepari la militon... aŭ la pacon?

La latina frazo « Se vi volas pacon, preparu la militon » taŭgas por lerneja eseo, sed ne por gvidi landon, kiu havas diplomaciaj, ekonomiaj kaj kulturaj rimedoj por esti forto de stabileco. Estus pli kuraĝe prepari la pacon!

Tio ne signifas esti malforta. Tio signifas investi en prevento de konfliktoj, internacia kunlaboro, maleskaligo, ekonomia kaj energia sendependeco. Ĉio, kio malpliigas la riskon de milito, antaŭ ol oni rezignas kaj akceptas ĝin. Tio eblas nur per dialogo kaj interkompreno.

Malvasta vojo por sekvi

Francio devas protekti sin, sed resti trankvila. Ĝi devas aŭskulti siajn militistojn, sed ne lasi ilin difini la politikan estontecon. Ĝi devas vidi la realajn minacojn, sed ankaŭ memori, ke minacoj naskiĝas kiam diplomatio malaperas.

Sekureco ne estas nur forto. La diskuto pri tio devas resti publika, klara kaj travidebla. Nur tiel

Francio povos protekti sin sen perdi tion, kio igas ĝin mem.

Demandoj por vi mem

Jen simplaj demandoj por pripensi. Miaj opinioj aŭ ideoj tute ne gravas, vi devas pensi vi mem!

1. Kiuj estas la profundaj kaŭzoj de la milito en Ukrainio, kaj kiel la tuto de Eŭropo kontribuis al ĝi?
2. Kial Francio subtenas Ukrainion: por sekureco, por aliancoj, por valoroj, aŭ por sia internacia reputacio?
3. Kiom malproksimen lando devas iri por respekti siajn armeajn aliancojn sen perdi sian propran decidpovon?
4. Kia devas esti la rolo de la armeo en demokratio?
5. Kiel oni povas kritike pensi pri sekureco sen esti akuzata pri malrespondeco aŭ malpatriotismo?
6. Kiam oni ĉesis prepari la pacon por simple prepari la militon?
7. Kiuj diplomaciaj, ekonomiaj aŭ kulturaj rimedoj estis neglektitaj, kiuj povintus eviti la plialtiĝon de la konfliktoj?
8. Kiel eblas ne humiligi kontraŭulon, por ke estonta paco estu ebla, dum oni tamen defendas siajn interesojn?
9. Kiujn homajn, ekonomiajn aŭ sociajn oferojn oni rajtas postuli de la loĝantaro, kaj kiu decidas tion?
10. Kian rolon Francio vere volas havi en la mondo: arma potenco, diplomacia potenco, aŭ forto de stabileco?
11. Ĉu milito estas utila por iuj? Se jes, laŭ kiu maniero?